

# juna amiko

Novembro 2023 • n-ro 4/2023 (177)



△ *Eramus+*: La pola grupo en “Edistudio” en Pizo.

**PROGRESIGA REVUO  
POR LEGANTOJ  
INTER 10- KAJ  
100-JARAĜAJ**

*Konversaciaj temoj*: Familia ferio. *Lernejo*: Ekzamenaj skribaj taskoj. *Kantu kun Juna Amiko*: Mi preĝas ne por riĉ’.

*LUDE*: Kio doloras, pri tio ni ploras. *Interkultura Mondo*: “Miaj interkulturaj spertoj”. *Tra la mondo*: La 108-a Universala Kongreso de Esperanto en Torino. *Laste*: Whangarei kaj Waitangi.

# Koboldeto



Aŭtoro: Miguel Ángel Díaz, Tradukisto: José de Jesús Campos Pacheco

\*) Tineo: nokta papilio, ekz. vesto-tineo.



# Enhavo



**Enkonduke:** Karaj amikoj! (Stano Marček, SK); Karaj legantoj! (Ahmad Reza Mamduhi, IR) ..... 4

**Konversaciaj temoj:** Familia ferio, 1-a parto (Judit Felszeghy, HU) ..... 5



**Lernejo:** Ekzamenaj skribaj taskoj (Vuk Mladenović, Blanka Laslo, Danijela Petrović, RS) ..... 9

**Erasmus+:** La ponto de espero – Erasmus en Italio, kun Esperanto-laborlingvo (Małgosia Komarnicka, PL) ..... 10



**Kantu kun Juna Amiko:** *Mi preĝas ne por riĉ'* (Małgosia Komarnicka, PL kaj Raita Pyhälä, FI) ..... 12

**Muzika fantazio** 5, Ameriko kaj Eŭropo (José



de Jesús Campos Pacheco, CU, Vilhelmo Lutermano, DE kaj Luiza Carol, IL); Jubilea festo de *Juna Amiko* (Odelvis del Sol, CU) ..... 14



**LUME:** El mia kolora vivo (Pavel Rak, CZ) ..... 16

**LUDE:** Kio doloras, pri tio ni ploras (Mónika Molnár, CH) ..... 17



**Teatraĵeto:** Verda Cirko (José de Jesús Campos Pacheco, CU,

Luiza Carol, IL kaj Odelvis del Sol, CU) ..... 19

**Legu:** Kiel la diablo nevole kreis dezerton en Eŭropo (Martin Pta-siński, PL) ..... 21



**Legu librojn – premioj – konkursoj:** Proksimiĝas nova jaro



2024... (Małgosia Komarnicka, PL; Enrico Gaetano Borrello, IT) ..... 22



**Kuirarto:** Toskano de la kuir-arta flanko (Aleksandra Seghi, PL) ..... 29

**Interkultura Mondo:** “Miaj interkulturaj spertoj”. Du



jubileoj de *Juna Amiko* kaj intervjuo (Elena Nadikova, RU; Stano Marček, SK) ... 31

**Tra la mondo:** La 108-a Universala Kongreso en Torino, 29.7-5.8.2023 (Liba Gabalda, IT) ..... 35



**Krucenigmo:** Solvo el la antaŭa numero (Stano Marček, SK) ..... 36

**LASTE:** Whangarei kaj Waitangi (Stefan MacGill, NZ/HU) ..... 37



**Landaj Reprezentantoj –** Perantoj de *Juna Amiko* ... 39

**Eldonanto** de *Juna amiko*: Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). **Jura sidejo**: Centra Oficejo de UEA, Roterdamo, Nederlando. **Retejoj**: Ĉefaj informoj pri *Juna Amiko*: <http://ilei.info/revuoj/?lingvo=eo>. Historio de la revuo: [http://eo.wikipedia.org/wiki/Juna\\_Amiko](http://eo.wikipedia.org/wiki/Juna_Amiko). La numeroj de 0 ĝis 154 (1972 ĝis 2018) publike legeblas ĉe: [www.eventoj.hu/juna-amiko/](http://www.eventoj.hu/juna-amiko/). Vidu ankaŭ [lernu.net](http://lernu.net) kaj [dukado.net](http://dukado.net).

**Redaktoro**: Stano Marček (Zvolenská 15/21, SK 036 01 Martin, Slovakio), [stano.marcek@gmail.com](mailto:stano.marcek@gmail.com) aŭ [redakcio@gmail.com](mailto:redakcio@gmail.com). **Lingvaj reviziantoj**: Karine Arakeljan (Armenio), Doi Ĉieko (Japanio) kaj Utho Maier (Germanio). **Rubrikestroj**: Judit Felszeghy, Stefan MacGill (ambaŭ el Hungario), Małgosia Komarnicka (Pollando), Mónika Molnár (Svislando), Elena Nadikova (Rusio), Luiza Carol (Israelo), José de Jesús Campos (Kubo), Raita Pyhälä (Finnlando). Presita en Slovakio. **Administranto**: Hamzeh Shafiee, [ilei.oficejo@gmail.com](mailto:ilei.oficejo@gmail.com). La sekva numero aperos en Februaro 2024. **Limdatoj por sendi kontribuojn**: ĝis la fino de Januaro, Aprilo, Aŭgusto kaj Oktobro. **Jarabono** € 18 en t. n. A-landoj kaj € 13 en B-landoj, laŭ la kategorioj de UEA (€ 15 kaj € 12 por mendo de 3 aŭ pli da ekz. al la sama adreso). Reta varianto: A-lande € 11, B-lande € 7.

ISSN 0230 1318



# Karaj amikoj!

**F**iniĝas la bela kaj jubilea jaro 2023 de nia kara *Juna Amiko*: 50-jaroj de ĝia ekzisto – kaj ankoraŭ unu eta: 10 jarojn mi redaktas ĝin. Pri ambaŭ jubileoj enestos kelkaj artikoloj ankaŭ nun. Kaj koran dankon pro ĉiuj gratuloj!

La rubriko *Konversaciaj temoj* okupiĝos pri diversaj eblaj familiaj feriadoj. Sekvos artikolo pri Esperantaj ekzamenoj en Serbio kaj informoj pri “La ponto de espero” – brila projekto Erasmus+ kun Esperanto-laborlingvo en Italio. Kun Saliko el Finnlando ni en la rubriko *Kantu kun Juna Amiko* kantas kristnaskan kanton kaj tuj poste lastfoje vizitos Esperantan teatraĵeton “Muzika fantazio”, kun bongusta, piknika, multkolora kaj plenmuzika festo de nia jubileo. Via vivo denove fariĝos pli kolora en la

rubriko *Lume*, iom dolora pro la rubriko *Lude* kaj iom verda pro plia teatraĵeto *Verda Cirko*. En *Legu kaj ĝuu* ni vizitos Nacian Bibliotekon de Esperanto en la urbo Massa, kun intervjuo kun Enrico Gaetano Borrello, ni ekkonos flagon kaj simbolon de Esperanto kaj tri ĉinajn legendojn, Esperante rerakontitajn de la ĉina poeto Minosun. Kun Aleksandra Seghi ni gustumos toskanajn mangaĵojn kaj en la rubriko *Interkultura Mondo* ni akiros “interkulturajn spertojn” kun gajaj rememoroj de via redaktoro. Sekvos ekskurso al la 108-a Universala Kongreso de Esperanto en Torino, Italio, solvo de la pasintnumera *Krucenigmo* kaj en la rubriko *LASTE* ni kun Stefan MacGill malkovros novajn belegajn lokojn en Nov-Zelando, la urbojn Whangarei kaj Waitangi. Agrablan legadon, bonan sanon kaj belajn jarfinajn kaj novjarajn festojn deziras al vi via redaktoro **Stano Marček**

# Karaj legantoj,

**U**ne mi deziras elkore gratuli al nia kara redaktoro s-ro Stano Marček, okaze de lia 10-jara jubileo ĉe *Juna Amiko*. Sen lia zorgoplena laborado ni ne havus nian ŝatindan revuon tia, kia ĝi estis dum la lasta jerdeko.

Due mi deziras antaŭgratuli la alvenon de la promes-plena novjaro 2024. Promes-plena ĉar mi – kiel tipa esperantisto – estas “esperanto”: t.e. mi esperas, ke la homaro, precipe la registaranoj, foriĝos de mal-amikecoj kaj militoj kaj ni ĝuos pacan jaron.

Vere estas bedaŭrige kaj ŝoke, ke hodiaŭ en la nuntempa mondo – post tiel longa historio de la homa civilizacio kaj kulturo – ekzistas pli ol 110 armitaj konfliktoj en pli ol 30 landoj! En MONA-landoj<sup>1</sup> pli ol 45 konfliktoj, en Afriko pli ol 35, en Azio 21 kaj en Eŭropo okazas 7 armitaj konfliktoj! Parto el ili komenciĝis lastatempe, dum la aliaj daŭris pli ol 50 jarojn<sup>2</sup>.

Pli ol 238.000 homoj – t.e. preskaŭ kvarono de miliono da homoj – mortis tutmonde en la konfliktoj nur dum la jaro 2022. Ĉi tio markas 96-procentan pliigon kompare kun tiaj mortoj, ligitaj al la jaro 2021.


Ĉirkaŭ 2 miliardoj da homoj – nome almenaŭ kvarono de la tuta monda populacio – nuntempe loĝas en konflikt-trafitaj areoj.

La meza ekonomia kosto de perfortoj en la 10 plej konflikt-trafitaj landoj en la mondo estas ekvalenta al 41 % de ilia malneta enlanda produkto (MEP).

Konfliktoj absorbas ĉirkaŭ 80 procentojn de la homaj bezonoj; ekzemple en 2016 la kosto de konfliktoj tutmonde estis je miriga sumo de 12.8 miliardoj da eŭroj. Tia sumo sufiĉas por malaperigi la mondan malsaton 42 fojojn<sup>3</sup>.

**Ahmad Reza Mamduhi**

1) MONA: mallongigo de Mez-Oriento kaj Nord-Afriko. 2) <https://geneva-academy.ch/galleries/today-s-armed-conflicts>. 3) [www.globalcitizen.org/en/content/facts-about-world-conflicts/](http://www.globalcitizen.org/en/content/facts-about-world-conflicts/)



# Familia ferio, 1-a parto

Help-materialo por progresemluloj. Rubrikestro: Judit Felszeghy

## I. Kiel elspezi la monon de Panjo?

**Panjo (P), Patro (Pt), Katrina (K) 18-jara, Stefano (S) 15-jara kaj Dora (D) 10-jara, gefiloj babilas hejme, dum vespermanĝo.**

K – Panjo, kion vi volis diri al ni? Ĉu iu problemo?

S – Ĉu de la lernejo iu novaĵo? Ĉu vi malbone kondukis, Dora?

D – Ne, tute ne! Eble vi!

P – Sufiĉas! Ne komencu disputon ĉe la tablo! Post la vespermanĝo mi diros ĉion!

S – Kial ne ĝuste nun?

P – Karaj miaj, ni atendu Paĉjon, li portos enen la viandon el la bakujo.

Pt – Mi jam estas alvenanta kun la viando, ni povos komenci la vespermanĝon. Bonan apetiton!

Ĉiuj – Bonan apetiton.

S – Panjo, diru jam, mi petas vin, pri kio temas?

P – Mi deziras anonci, ke granda ĝojo kaj honoro atingis min. Pro mia bona laboro dum la jaro mi ricevis plian monon, kaj ni povos elspezi ĝin.

K – Ege bone! Gratulojn, Panjo! Ĉu ni ĉiuj ricevos donacojn?

S – Prefere dividi la monon! Kiom multe vi ricevis, Panjo?

D – Ne, mi la donacon deziras!

Pt – Gefiloj! Ĉu vi ne pensas, ĉar la monon ricevis Panjo, decidus ŝi, kiel elspezi ĝin? Cetere, ni povus

aĉeti ankaŭ ion utilan, kio helpas Panjon en la hejma laboro.

P – Ho, vi estas afabla! Sed mi pensis, ke tiun monon ni elspezu kune.

S – Ni aĉetu novan televidon! Kun granda ekrano. La malnova povas trovi lokon en mia ĉambro.

D – Ne televidon ni aĉetu, sed ion pli interesan! Eble hundidon! Kun ĝi ni ĉiuj povas ludi.

Pt – Infanoj, ni unue aŭskultu Panjon!

P – Mi deziras ion, pri kio ni ĉiuj ĝoju, kaj ni ĉiuj estu kune. Tiel venis la ideo kune ferii, kaj pasigi kelkajn tagojn kune kaj agrable ie.

D – Ĉu ni veturos ien?

K – Kiam ni veturos? Mi baldaŭ havos ekzamenojn, ĝis tiam mi devos sole lerni.

Pt – Kara mia, tio estas vere tre bona ideo! Katinjo, ni certe atendos ĝis la fino de viaj ekzamenoj.

S – Ni veturu al la montaro! Nuntempe ekas ski-kursoj, ni povos lerni skii!

K – Laŭ mi pli agrable estus ferii en varma loko, kaj ĝui la sunon!

D – Ni veturu tien, kie estas multaj infanoj kaj ludoj!

Pt – Katinjo kaj Steĉjo, morgaŭ estos sabato, provu trovi tempon kaj por zorge rigardi en la interreto la proponojn. Trovu lokon, tranoktejon, kie ni ĉiuj povas amuziĝi.

Steĉjo povu sporti, Katinjo baniĝi, Dorinjo ludi, kaj ni du, kun Panjo ripozi!





## II. Diversaj ideoj pri familia feriado

**Panjo (P), Patro (Pt), Katrina (K) 18-jara, Stefano (S) 15-jara kaj Dora (D) 10-jara, gefiloj babilas hejme, en la sekva vespero, ĉe la manĝotablo.**

- S – Kun Katinjo ni havas gravajn informojn!
- Pt – Ho, ĉu vere? Ĉu vi inventis ion?
- S – Jes! Ni havas tri proponojn pri la feriado, kaj ni povos voĉdoni. Katinjo prezentos ilin.
- K – Do, la unua propono estas la feriado ĉe la maro. Mi kontrolis jam ĉion! La hotelo situas nur 150 metrojn de la marbordo, kaj havas propran strandon. Ni ricevos bufedan matenmanĝon kaj vespermanĝon. Ankaŭ kafo kaj teo estas en la ĉambro je dispono. Eblas mendi duoblan ĉambro, kun duobla lito, kaj la alia kun du plus unu litoj. Tiu ĉambro estus por ni. Estas du banĉambroj, unu kun bankuvo kaj la alia kun duŝejo. Kompreneble en ambaŭ troviĝas necesejo. La balkonoj rigardas al la marbordo. Ĉu plaĉas la ideo?
- Pt – Hm... Ĝi sonas vere allogel!
- P – Ankaŭ al mi plaĉas! Jam antaŭ ege longe ni feriiis ĉe la maro, ĉu ne, mia kara? *(P. kun rideto rigardas al Pt.)*
- D – Ni iru al la marbordo! Ankaŭ mi



- ankoraŭ ne vidis la maron!
- Pt – Atendu, Dorinjo, ni unue aŭdu la duan proponon! Katrina, bonvolu!
- K – Dua propono. Feriado en la Norda Montaro. Tie eblas mendi lignajn dometojn por kvar aŭ ses personoj. La dometoj estas duetaĝaj, sube estas duobla lito, tablo, seĝoj, ŝranketo, kaj supre du ĉambretoj po du litoj. Sube troviĝas ankaŭ la banĉambro kun duŝejo kaj necesejo. En la ĉefa konstruaĵo estas komuna kuirejo.
- S – Laŭ mi tio estas ege bona kaj romantika!
- K – Estas ankoraŭ unu plia propono. Ni malkovris belan hotelon, antaŭe ĝi estis loĝ-kastelo de aristokrata familio. Ĉirkaŭ la konstruaĵo troviĝas parko, kaj ankaŭ ludparko kun multaj ludiloj. Ni povas mendi grandan ĉambro, kun du litoj, kaj unu granda malfermebla kanapo. Ni ricevos matenmanĝon kaj vespermanĝon.
- D – Ni iru al la kastelo!
- Pt – Estas malfacile elekti! Kiom kostas la kastelo, ĉu vi scias?
- S – Ĝi estas la plej multekosta... – mi rigardas, ni notis ankaŭ la prezojn. 994 eŭrojn por unu nokto kaj por ni ĉiuj, ĉar Dora ricevos rabaton. La malplej kosta estas la montara kabano. La tuta kabano kostas nur 486 eŭrojn.
- K – La apudmara hotelo ne estas tro multekosta, por unu nokto kaj por ni ĉiuj ni pagus 1820 eŭrojn.
- Pt – Kiom???
- K – La sumo estas por ni ĉiuj kaj por tri tagoj.
- Pt – Kie vi trovis tiun hotelon?
- K – Ĝi staras tuj apud la maro, nur je 7-kilometra distanco de Belurbo.
- Pt – Belurbo situas tre malproksime! Pli ol mil kilometrojn! Mi certe ne emas tiom multe sidi malantaŭ la stirilo!
- S – La kabano en la Norda Montaro



troviĝas pli proksime, ni veturos tien ne pli ol 200 kilometrojn.

- P – Kiel ni solvos la manĝadon tie?  
 S – Katinjo jam diris, ke komuna kuirejo estas tie. Ni povos aĉeti manĝaĵojn, kaj ankaŭ kuiri tie.  
 P – Karaj, se ni ferias, ankaŭ mi volas ferii, kaj ne staradi en komuna kuirejo inter la potoj kaj labori.  
 D – Ni voĉdonu fin-fine!  
 Pt – Unue ni bone pripensu, voĉdonu, kaj postmorgaŭ vespere ni vidos la rezulton. Tiam ni decidus, kien ni veturu.

### III. Kiam veturi?


**Panjo (P), Patro (Pt), Katrina (K) 18-jara, Stefano (S) 15-jara kaj Dora (D) 10-jara, gefiloj babilas hejme, post du tagoj, ĉe la manĝotablo.**

- Pt – La rezultoj de la voĉdono: Unua propono – unu voĉo.  
 S – Tio estas certe de Katinjo!  
 Pt – Dua propono, tio estas pri la Norda Montaro - unu voĉo.  
 S – Neeble! Ĉu neniu plia voĉdonis por tio?!  
 K – Ĉu vi vidas, Steĉjo, nure al vi tio plaĉis!  
 D – Paĉjo, la trian, la trian diru! Kiom da voĉdonoj ĝi gajnis?  
 Pt – Unu. Ankaŭ la tria propono ricevis nur unu voĉon.  
 S – Sed kiel tio eblas? Ni estas ja kvin!  
 P – Miaj karaj, mi fakte sindetenis, ĉar al mi plaĉis ĉiuj tri proponoj.  
 Pt – Mi konfesas, ke ankaŭ mi ne voĉdonis, ĉar mi pensis pri iu kvara eblo. Ĉu tio interesus vin?  
 Ĉiuj: – Jes, certe! Diru Paĉjo! Kion vi elpensis?  
 Pt – Do, sude, sed ne ĉe la marbordo, ene de 300-kilometra distanco, inter malaltaj montetoj troviĝas bieno. Tie estas restaĵoj de iama fortikaĵo kaj

malgranda renovigita kastelo. Krom la kastelo estas tie ŝtonaj dometoj, kiuj similas al mezepokaj domaĉoj, sed interne ili estas luksaj tranoktejoj. Oni malkovris tie ankaŭ varman akvon, kaj konstruis grandan kovritan kaj subĉielan banejon. Ili havas ankaŭ ĉevalojn, do, eblas eĉ rajdi. Krome estas tie malgranda bestoĝardeno, kun junaj bestetoj, ŝafido, cervido, mi ne scias kio ankoraŭ, kiuj alkutimiĝis al la homoj, kaj oni povas karesi ili. Ĉu mia propono plaĉus al vi, gefiloj?

- Ĉiuj: – Bona ideo, Paĉjo! Ni trovos tie ĉion! Kiam ni veturos? Kiom tio kostas? Ni veturu tuj! Necesas mendi la ĉambrojn, mi volas loĝi en la kastelo!  
 P – Karaj, unue ni decidu, kiam ni veturu, por ke Paĉjo povu mendi la ĉambrojn. Mi pensas, plej taŭga tempo estos dum la vintra ferio, por tiu periodo ankaŭ mi ricevos liberajn tagojn.  
 K – Mi jam diris, ke por mi tio neniel konvenas, ja mi devos lerni por la januaraj ekzamenoj. Ili finiĝos fine de januaro, sed eble mi finfaros ĉion ĝis la 25-a. Poste mi estos libera, kiel birdo, kaj povos iri ien ajn!





- S – Poste mi jam nenien iros! MI jam enskribiĝis por kvintaga ski-kurso, ĝi ekos ĝuste la 25-an de januaro!
- P – Ni povus veturi eĉ en marto, ĉu ne?
- Pt – Bedaŭrinde, ne. Komence de la monato venos eksterlandaj fakuloj, mi devas nepre ĉeesti, kaj ankaŭ okupiĝi pri ili! Temas pri grava internacia projekto, kiun ni kune prilaboros.
- D – (*preskaŭ plorante*) – Kiam do ni veturos?!
- Pt – Ne ploru, dolĉulineto mia. Se estas ankoraŭ liberaj ĉambroj, ni povus veturi jam la sekvan semajnon.
- P – Mia kara, ĉu vi forgesis, ke dum la sekva semajnfino estos la datreveno de mia patrino! Ŝi plenumos nun sian sepdekan jaron! Ŝi planas grandan festenon, invitis la tutan familion, mendis la manĝaĵon el la restoracio!
- Pt – Ho, jes, vi jam diris, kaj mi preskaŭ forgesis pri tio!
- D – (*plorante*) – Kiam ni veturos?
- K – Ĉu ni ne povas trovi unu semajnon, kiam neniu el ni havas iun programon?
- P – Karaj, mi proponas, ke nun ni fiksi la datumon de nia komuna feriado al Aprilo! Ni trovu semajnon, kiam neniu havu programon, kaj tio estos la tempo por nia familia feriado!

## Vortklarigoj:

**Skii:** gliti sur neĝo, uzante longajn mallargajn tabulojn, fizikajn al la ŝuoj.

**Bufedo:** tablo, aŭ simila meblo kun diversaj manĝaĵoj, el kiuj la invititaj povas laŭplaĉe preni. **Kabano:** simpla dometo, ofte el ligno. **Kastelo:** granda loĝloko, defendebla kontraŭ atakoj per altaj muroj; granda konstruaĵo, kie loĝas reĝo aŭ alia grava persono. **Rabato:** malaltigo de prezo. **Voĉ-doni:** esprimi sian opinion pri iu demando aŭ propono, por ke ĝi estu nombrata. **Sin-deteni:** ne partopreni en la voĉdonado. **Fortikajo:** fortigita konstruaĵo por defendi la loĝantojn en ĝi.

**Rajdi:** veturi, sidante sur la dorso de ĉevalo aŭ alia besto. **Dolĉ-ul-in-eto:** karesa alparolo al malgrandaj knabinoj.

## Taskoj:

- I. 1. Legu (vi povas plurfoje) la unuopajn dialogojn kaj respondu buŝe la demandojn: Kion volis anonci la Patrino? Kial ŝi ricevis monon krom la salajro? Kiu deziris la dividon de la mono? Kie deziris ripozi Katrina? Kial ne estis taŭgaj la proponitaj tempoj por la gepatroj kaj por la infanoj – rakontu en apartaj frazoj, kiu kian programon havos? Kiam okazos la familia ferio?
2. Prezentu la tri proponojn de la infanoj, kaj ankaŭ la proponon de la patro! Priskribu la tranoktejojn, menciu ankaŭ la distancojn kaj la prezojn!
- II. Faru dialogojn kun via samkursano:
1. A. Mendu tranoktejon por geedza paro, demandu pri detaloj (lito, banĉambro, manĝoj, ktp), kaj indiku la datumon. B. Respondu, ke por tiu datumo oni ne povas doni tian ĉambron, nur pli koston. Interkonsentu, ĉu pli koste, aŭ en alia tempo.
2. A. Interesiĝu en vojaĝoficejo, kiel eblas lerni skii, kiam kaj kiom tio kostas. Demandu ankaŭ pri detaloj, tranoktejo, manĝo, vojaĝo. B. Donu 2 – 3 proponojn, en diversaj lokoj, kun diversaj kondiĉoj.
3. A. Vi deziras ferii kun via(j) (ge-) amiko(j). Faru proponon kien veturi. B. (C.+D...) Esprimu malkontenton, kaj proponu ŝanĝojn. Fine de la 10 – 15 fraza dialogo alvenu al interkonsento!
- III. 1. Via amik(in)o letere (rete) rakontas al vi, ke li/ŝi ricevis kroman salajron. Li/ŝi demandas vin, kion aĉeti ke la tuta familio estu kontenta. Respondu al li/ŝi!
2. Priskribu – letere aŭ buŝe – vian plej bonan, aŭ plej interesan, aŭ plej malagrablan feriadon kun viaj familianoj. Rakontu, kial ĝi plaĉis aŭ malplaĉis al vi!





# Ekzamenaj skribaj taskoj

**En junio 2023 en Serbio okazis landaj, ĉeestaj ekzamenoj el Esperanto, post 7-monataj kursoj.**

**S**ekvas 3 eseoj el la skriba parto de la ekzameno de la A2-nivela paroliga kurso, kiun gvidis Radojica Petrović. La blindaj kandidatoj, kiel Danijela, tiun taskon faris per brajlaj skribmaŝinoj.

**Temo: Invitletero al amiko el alia lando**

Kara Boris,

mi esperas, ke vi bonfartas. Ni ne renkontiĝis tro longe. Vi jam scias, ke baldaŭ estos mia naskiĝtago. Mi decidis fari feston. Tial mi nun invitas vin veni en Serbion, al Novi Sad, por festi kune.

Mia naskiĝtago ne estus sama sen vi. Se vi volas, vi povas veni kun via hundo. Dum la festo, via hundo povos resti en mia ĝardeno. Tie ĝi povos ludi kun mia hundo.

Mi scias, ke vi ne loĝas tre malproksime, kaj ke vi verŝajne alvenos per aŭto. Se vi eble decidus veni per aviadilo, skribu al mi leteron, por ke mi sciu kiam mi venu al la flughaveno por atendi vin.

Kore, Via plej bona amiko,

**Vuk Mladenović**

**Temo: Karaj memoroj**

El kongreso de ILEI

En la jaro 2019 mi havis la eblecon partopreni en granda Esperanta kongreso. Tio estis renkontiĝo de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) en la urbo Čačak.



Skriba parto de la ekzameno en Beogrado.

Esperantistoj, kiuj estas ankaŭ instruistoj, venis el diversaj landoj el la tuta mondo. Mia patrino invitis min tien. Ni veturis kune el Subotica per aŭtobuso.

Ĉar tiu evento okazis en nia lando, en Serbio, ni estis gastigantoj. Dum la tuta kongreso ni, serbiaj partoprenantoj, estis kvar al kiuj la aliaj povis demandi aŭ diri siajn dezirojn.

Esti kvin tagojn inter esperantistoj rapide ŝanĝis mian pensadon. Tuttage mi uzis Esperanton kaj kelkfoje eĉ pensis en Esperanto. Por mi tio estas belega multkultura memoro ĉar mi konatiĝis kun diversaj afablaj personoj kaj ankaŭ pro tio, ke mi estis kun mia kara patrino.

**Blanka Laslo**

**Temo: Mia lernejo**

Mia lernejo troviĝas en Zemuno. Ĝia nomo estas "Kosta Manojlović". Ĝi estas muziklernejo.

Kiam mi estis lernantino, mi frekventis bazlernejon kaj mezlernejon tie. Nun mi estas instruistino kaj mi instruas pianon. Mi laboras kun blindaj kaj vidantaj lernantoj. Iuj lernantoj estas tre diligentaj, ili partoprenas en konkursoj, kiam ili estas pretaj. Ili ankaŭ ofte ludas en koncertoj en la lernejo.

Mi loĝas malproksime de Zemuno kaj mi iras en la lernejon per buso lunde, marde, ĵaude kaj vendrede, iam ankaŭ merkrede, sed ne ofte. Mi havas tre bonajn gekolegojn. Kiam mi havas tempon, ni trinkas kafon kaj parolas pri diversaj aferoj. Ili ofte helpas al mi kiam tio necesas.

Mia lernejo estas granda. Ĝi uzas du konstruaĵojn. La unua estas la ĉefa, kie ni organizas kunvenojn kaj infanajn koncertojn. Ĝi estas en la centro de Zemuno. La alia, kie mi instruas, troviĝas proksime de la ĉefa lernejo kaj apartenas al la lernejo "Veljko Ramadanović", kiun frekventas blindaj gelernantoj. Ĝi estas por mi kvazaŭ mia dua hejmo.

**Danijela Petrović**



# La ponto de espero – Erasmus en Italio, kun Esperanto-laborlingvo

**Mi estas unu el la partoprenintoj de la eŭropa programo Erasmus+. Ĝi estas mirinda programo! Mi volas dividi miajn observojn kun vi kaj kuraĝigi vin uzi tiajn programojn.**

**K**io estas Erasmus+? Por respondi tre mallonge – ĝi estas eduka programo, kiu ebligas la realigon de internaciaj projektoj kaj estas financata de Eŭropa Unio. Partoprenantoj de tiaj programoj akiras novan sperton, kapablojn, sciojn, ekkonas diferencajn kulturojn kaj ligas lernadon kun vojaĝoj kaj novaj internaciaj kontaktoj.

Mi reprezentas la estraron de la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado, kiu de multaj jaroj klopodas disvolvi la organizon multdirekte. Ni sukcese partoprenas en multaj projektoj, kiujn ebligas la urbo Vroclavo, ricevante financadon por la efektivigo de niaj programoj, kiuj ankaŭ rekomendas kaj reklamas la lingvon Esperanto. Ĉi-foje la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado realigas eŭropan projekton kadre de la programo Erasmus+, kies laborlingvo estas Esperanto.

Kial Esperanto? Ĉar Esperanto estas “ponto de espero” (kiel unua parto de la titolo de nia projekto), ĝi estas ponto de intergeneracia kaj internacia kunlaboro, preter ĉiuj kulturaj, ideologiaj aŭ religiaj dividoj. Ĝi estas ponto, kiu instruas toleremon kaj respekton, ligas homojn kaj faciligas ilian reciprokajn komunikadon en neŭtrala lingvo, kiu ne rilatas al iu ajn nacio.

Kiel ni komencis? Ni esploris la bezonojn de nia organizaĵo. Sed la pandemio de Kovim-19 kaŭzis ĝian stagnadon. Ni zorge analizis la situacion kaj serĉis solvojn. Ni provis respondi la demandon: Kion fari por realigi la novajn bezonojn de la organizaĵo? Ni notis ĉiujn ideojn. Ni sciis, ke ni sukcesos, nur se ni aliĝos al la eŭropa programo Erasmus+. Kompreneble ni timis, sed ni ne havis alternativon.

Kion plu? Ni devis trovi eksterlandan organizaĵon, ke ĝi kunlaboru kun ni kiel “gastiga organizaĵo”, kiu helpis al ni atingi niajn celojn. Oni povas uzi la portalon EPALE (listo de eblaj partneroj). Ni uzis Esperantajn kontaktojn kaj elektis Italian Esperanto-Instituton – *Instituto Italiano di Esperanto*.

Kial Italio kaj Itala Esperanto-Instituto? Ĉar multaj prestiĝaj eventoj estas organizitaj en Italio, inkluzive de: ĉi-jare en Torino – la 108-a Universala Kongreso de Esperanto; en Lignano Sabbiadoro – la 56-a Kongreso de la Internacia Asocio de Esperanto-Instruistoj; en Pizo – Zamenhof-Tagoj. Itala Esperanto-Instituto – *Instituto*





*Italiano di Esperanto* estas organizaĵo, kies laborlingvo estas Esperanto. Ĝi kunlaboras kun Itala Esperanto-Federacio (*Federazione Esperantista Italiana*) kaj aliaj esperantistaj kaj neesperantistaj organizaĵoj. La Instituto ĉefe zorgas pri lernado kaj disvastigado de la Esperanto-lingvo, sed ankaŭ kunlaboras kun multaj profesiuloj.

Sekva paŝo? Nun restas nur registri nian organizaĵon sur la interreta platformo kaj plenumi la formularon pri financado. Ĝi ne estas malfacila. Tamen, kiam ĝi estas farita por la unua fojo, malfacilaĵoj aperas. La formularo enhavas limon de signoj kaj ni bezonis iom da tempo por redakti la tekston kaj adapti ĝin al la formularpostuloj. Krome, ni devis ekkoni la specifan vortprovizon, kiu estas uzata en la formularo. Ni konvinkigis, ke la “Programa Gvidilo” estas nepre leginda por ĉiu, kiu laboras pri la projekto kaj kompreneble kontakto kun konsultistoj de la programo Erasmus+. Ĉi tiuj personoj havas ampleksan scion, ili estas solidaj, paciencaj kaj donas ampleksajn respondojn. Tre gravas bone pripensi kaj prilabori la projekton. Ricevo de financado dependas de la nombro da poentoj, aljuĝitaj al la projekto de la Nacia Agentejo – ĉi tio estas konkurso de projektoj.

Ĉu ni sukcesis? Jes! Post kelkaj monatoj ni ricevis oficialan informon, ke nia projekto estis aprobita por la efektivigo. Ni komencis novan etapon en la evoluo de nia organizaĵo kaj kunlaboron kun eŭropa institucio, Itala Esperanto-Instituto – *Instituto Italiano di Esperanto*. La ĝojo estis grandega, sed ankaŭ la respondecado sufiĉe granda. Ekde la 1-a de aŭgusto funkcias nia blogo – <https://m.facebook.com/profile.php?id=100095320484386>

Kio sekvas? Nun komenciĝis la plej intensa tempo de la preparoj kaj streĉaj situacioj. Prokrastoj en financado (ŝubskribo de la kontrakto kaj transdono de la mono) signifis, ke ni devis fari multajn ŝanĝojn, kompreneble ne en la projekto, ĉar ĝi estis jam aprobita.

Ekzemple, ni devis ŝanĝi la daton de la “prepara vizito” kaj loĝlokon (ĉar la elektita hotelo ne povis atendi la antaŭpagon). Ni devis venki multajn similajn situaciojn... Ili estas kompreneble problemoj, kiujn ĉiu projektgvidanto venkos.

La “prepara vizito” estas tre grava. Ĉi tio estas kelktaga vizito de reprezentantoj de la organizaĵo, por pli bone koni la reprezentantojn de la gastiga organizaĵo kaj kontroli la kondiĉojn, en kiuj la teamanoj vivos kaj lernos.

En frosta septembra mateno, kun granda espero, ni ekiris el Pollando al Italio, al Toskanio... Ni elektis ekologian vojaĝon, aŭtomobile, ne aviadile. Ni vojaĝis iom pli longe, sed ni havis la ŝancon admiri belajn vidaĵojn, gustumi diversajn pladojn kaj pli bone ekkoni unu la alian.

Italio akceptis nin per sunbrilo. Ni loĝis en Tirrenia, dekkelkajn kilometrojn de Pizo, en la belega hotelo Beverly Park Residence. Ni havis kelkajn minutojn al la plaĝo... Iom pli da tempo, preskaŭ duonhoron, ni bezonis por alveni al EdiStudio en Pizo, kie okazis niaj laborsesioj – ĉiutage Esperanto kaj unufoje semajne laborsesioj pri demokratio, cifereco, mnemotekniko (*memorarto*) kaj ekologio. Ni ankaŭ ekkonis la italan edukan sistemon (partoprenante en lernejoj lecionoj) kaj la bibliotekan sistemon (ĉe la Ŝtata Biblioteko de Esperanto en Massa), kaj ni plibonigis nian konon de Esperanto.

Malgraŭ la riĉa programo, ni ankoraŭ havis tempon por konversacioj, vizitoj kaj ripozo... Ni realigas la projekton kun homoj plenaj de pasio, ni konstruas partnerecon, interŝanĝas sciojn, ideojn kaj antaŭ ĉio ni promocias internacian kunlaboron...

Mi priskribos nian belan ĉiutagan vivon en Italio, kiun ni realigas danke al la projekto, financita de Eŭropa Unio, venontfoje...

**Małgosia Komarnicka**  
(Kuniniciatintino kaj gvidantino de la projekto Erasmus+)





# La sorĉa kanto-mondo

La rubrikon preparas Małgosia Komarnicka

[malgosia.junaamiko@gmail.com](mailto:malgosia.junaamiko@gmail.com)



**Kanto akompanas nin ĉie... Ni volonte aŭskultas ĝin, ĉar ĝi helpas vidi kaj krei alimaniere la mondon, ebligas revii, aŭ transdoni niajn sentojn.**

**Ĝ**i ankaŭ helpas akiri pli bonajn rezultojn dum lernado, ĉar lernantoj, kantante, samtempe lernas, kreskigas sian emocian engaĝiĝon en la lerno-procezo. Sufiĉas nur ekkanti – kaj ili tuj memoras la kanto-vortojn. Tiamaniere la lernantoj plej bone kaj sugestite alproprigas al si la materialon de la leciono, ofte ne konsciante, ke ili ekzercas fremdan lingvon. La laboro kun kanto sentigas ĝojon kaj kontenton al la lernantoj, kaj do ni ne malhelpu ĉi tiun agrablecon de kantado dum la Esperanto-lecionoj.

Fine de la jaro mi proponas kanton, kiu estas ligita kun Kristnasko, kiun ni decembre malpacience atendas... La kanton “Mi preĝas ne por riĉ’, prestiĝ’” sendis Raita Pyhälä, konata al niaj legantoj kiel Saliko. La vortojn de la kanto skribis svedlingva, la plej fama fabelisto, sed ankaŭ sciencisto kaj historiisto, Zacharias Topelius en la jaro 1887 kaj do en la sama jaro, dum kiu naskiĝis Esperanto. La muzikon komponis la plej fama finna komponisto Jean Sibelius en la jaro 1909. En la jaro 2003 la kanton esperantigis Börje Holmberg kaj ĝi aperis interalie en *Espero Katolika* 1-3/2009.



## *Mi preĝas ne por riĉ’, prestiĝ’*

*Mi preĝas ne por riĉ’,  
prestiĝ’, sed por la Dia glori’  
sur tero pac’ dum Kristnaskiĝ’,  
al homoj Dia favor’!*

*La fest’, al Di, agrabla plej,  
nin ravu en ĉi tiu ej’!*

*Mi preĝas ne por riĉ’, prestiĝ’,  
sed paco dum Kristnaskiĝ’.*

*Mi havu hejmon en patri’  
kun gaja infanar’,  
vesperon kun la vort’ de Di’  
lumanta en malklar’,  
por ke mi vivu en soci’  
de ĝojo, fido, kredo pli!*

*Mi havu hejmon en patri’,  
kun lum’ de vort’ de Di’!*

*Kaj al povrul’ kaj al riĉul’  
descendu sankta pac’!*

*Descendu graco sen postul’  
al nia vintra lac’!*

*Al ĉiu venu Vi, Sinjor’,  
ho vigliganta Redemptor’!*

*Vi al povrul’ kaj al riĉul’  
descendu sen postul’!*

**Kantu kaj lernu!** Bonvolu sendi al mi proponojn de viaj naciaj kantoj, por ke la legantoj de *Juna Amiko* havu la eblecon ekkoni belajn kantojn el la tuta mondo:  
[malgosia.junaamiko@gmail.com](mailto:malgosia.junaamiko@gmail.com)



# MI PREĜAS NE POR RIĈ'

Zacharias TOPELIUS  
Esperantigis Börje HOLMBERG

Jean SIBELIUS

Mi pre - ĝas ne por riĉ' pres - tiĝ' sed  
Mi ha - vu hej - mon en pa - tri' kun  
Kaj al po - vrul' kaj al ri - ĉul' des -

4

por la Di - a glor' sur te - ro pac' dum  
ga - ja in - fa - nar' ves - pe - ron kun la  
cen - du sank - ta pac' Des - cen - du gra - do

7

Krist - nas - kiĝ' al ho - moj Di - a fa - vor' La  
vort' de Di' lu - man - ta en mal - klar' por  
sen pos - tul' al ni - a vin - tra lac' Al

10

fest' al Di a - gra - bla plej nin ra - vu en ĉi ti - u ej' Mi  
ke mi vi - vu en so - ci' de ĝo - jo fi - do kre - do pli Mi  
ĉi - u ve - nu Vi Sin - jor' ho vi - gli gan - ta Re - demp - tor' Vi

14

pre - ĝas ne por riĉ' pres - tiĝ' sed pa - co - dum Krist - nas - kiĝ'  
ha - vu hej - mon en pa - tri' kun lum' de vort' de Di'  
al po - vrul' kaj al ri - ĉul' des - cen - du sen pos - tul'





# Muzika fantazio



## Akto 5. Ameriko

**Verdastelo:** Jen, ni atingis Amerikon.

**Reĉjo:** Kiun muzikilon ludas la knabo vidalvide de ni?

**Verdastelo:** Ĝi nomiĝas banĝo. ▶  
Nun ĝi estas tre populara muzikilo en Ameriko kaj vaste konata ankaŭ en la resto de la mondo. Sed ni proksimiĝu al la knabo. [Knabo 2 finas la ludadon.]



**Verdastelo kaj Reĉjo:** Brave! Gratulojn!

**Reĉjo:** Vi ludas bonege! Sed kial vi estas tiom malgaja?

**Knabo 2:** Kiel mi ne estu! Baldaŭ mi devintus trapasi gravan ekzamenon, por kiu mi lernis dum monatoj. Sed mi ne povos partopreni ĝin. Fripona lav-urseto ▶ kaŝe malfermis mian dorsosakon kaj ŝtelis la



▶ saketon, kien mi metis sandviĉon...  
La ŝlosilo de la bicikla ĉeno estis alkroĉita al la manĝajsaketo... Nun mia biciklo estas blokita. Mi ne

povas iri al la lernejo... Malbenita lav-urseto!

**Verdastelo:** Nu... Ne indas koleri kontraŭ tiu kompatinda lav-urseto... Ĝi estis ege malsata...

**Knabo 2:** De kie vi scias, ke ĝi estis kompatinda kaj malsata?

**Verdastelo:** Stelfeinoj divenas multajn aferojn.

**Knabo 2:** Ho jes, pardonu, ke mi ne rekonis vin, Verdastelo. Mi ja vidis vin en la paĝoj de "Juna Amiko". Ĉu vi venis por helpi min?

**Verdastelo:** Jes, certe. Mi alportis knabon el Eŭropo, kiu interesiĝas pri tutmondaj muzikiloj. Dum tiu ĉi nokto, mi permesas al Reĉjo uzi mian sorĉitan fluton. ▼

Li helpos vin.

Bonvolu, Reĉjo!

[Reĉjo ludigas la sorĉitan fluton. Aperas lav-urseto kun la ŝlosilo en sia buŝo. Ĝi metas ĝin apud la knabon kaj tuj forfuĝas.]



**Knabo 2:** Ho!!! Mi jam pardonas vin, fela amiketo. Dankon kara stelfeino! Dankon Reĉjo! Mi hastas, mi devas foriri...

**Reĉjo:** Jen, prenu frambokuketojn:



– el framboj de Eŭropa arbaro:

Tiel vi ne malsatos kaŭze de la lav-urseto.



**Verdastelo:** Kaj mi invitas vin partopreni la baldaŭan jubilean feston de "Juna Amiko".

– Ne forgesu kunporti vian banĝon por regali nin ĉiujn per via muziko. Kunportu ankaŭ geamikojn ajna-aĝajn. Ĝis baldaŭ!

**Knabo 2:** Dankon! Ĝis!  
[Knabo 2 malaperas.]



## Akto 6. Eŭropo

La sekvan matenon, en la sama dormoĉambro, el kiu komenciĝis la vojaĝo.

**Verdastelo:** Jen la fino de nia vojaĝo. Baldaŭ estos via naskiĝtago, Reĉjo. Kaj Avinjo donacos al vi bekfluton:



**Reĉjo:** Ĉu Avinjo diris tion al vi?

**Verdastelo:** Ne. Sed stelfeinoj scias multajn sekretojn. Via bekfluto ne estos sorĉita. Sed... se vi ludados diligente kaj persisteme, finfine vi igos ĝin eligi belan muzikon. Fakte ajna muzikilo, kiun vi volos ludi, postulos paciencon laboron. Se via entuziasmo ne perdiĝos dum kelkaj jaroj, vi ja povos fariĝi profesia muzikisto. Mi esperas, ke nia kunvojaĝo plifortigis vian intereson pri muzikiloj de la tuta mondo. Kaj certe pere de Esperanto vi povos plilarĝigi viajn konojn pri tutmonda muziko.

**Reĉjo:** Nun mi komprenas, kial vi diris hieraŭ vespere, ke songĉ-vojaĝo helpos min plenumi mem mian deziron.

**Verdastelo:** Jes. Ankaŭ fabel-vojaĝo estas speco de songĉ-vojaĝo. Do, kiam vi aŭskultas fabelojn, ankaŭ stel-feinoj ofte ĉeestas. Nun mi devas foriri. Ĝis baldaŭ, en la paĝoj de "Juna Amiko", okaze de ĝia festo! Invitu ankaŭ Avinjon kaj aliulojn.

**Reĉjo:** Dankon, dankon! Mi amas vin! Ĝis!

\*\*\*\*\* FINO \*\*\*\*\*

**Verkis:** José de Jesús Campos Pacheco, Vilhelmo Lutermano kaj Luiza Carol

*Muzika fantazio 5 kaj 6* legeblas kaj aŭdeblas ĉe: [esperantaretradio.blogspot.com/2022/08/muzika-fantazio-4.html](http://esperantaretradio.blogspot.com/2022/08/muzika-fantazio-4.html)

# Jubilea festo de Juna Amiko

La desegnisto Odelvis del Sol el Kubo desegnis plian bildon por la teatraĵo Muzika Fantazio. Temas pri la jubilea festo de *Juna Amiko*, kie geknaboj ĉe la fajro ludas kaj piknikas dum la jubileo.



**S**ur la bildo estas Reĉjo kun kelkaj geknaboj, kiuj kantis okaze de la 50-a datrevena jubileo de *Juna Amiko*. José de Jesús Campos Pacheco preparis demandojn, kiujn la legantoj respondu:

1. Kie Reĉjo kaj la ceteraj geknaboj piknikas? Ĉu la bestoj ankaŭ piknikas?
2. Ĉu la feino Verda Stelo estas la respondeculino pri tiu pikniko?
3. Kion ili manĝos kaj trinkos?
4. Ĉu okazos danca kaj muzika konkuro dum la jubilea festo?
5. Ĉu la avinjo de Reĉjo partoprenos en la jubilea festo?
6. Ĉu vi povas desegni la avinon de Reĉjo? Odelvis ne desegnis ŝin, ĉar ŝi tiam estis en kiurejo kaj bakis ĉokolandan kukon.
7. Kion vi manĝas kaj trinkas kiam vi piknikas? Kial?



# El mia kolora vivo

Verkinto kaj desegninto: Pavel Rak



Kolorigu la suban bildon laŭ la supra! Kion vi vidas sur la bildoj?  
Kiom da diferencoj en la du bildoj vi trovis?




# Kio doloras, pri tio ni ploras

La rubrikon prizorgas: **Mónika Molnár**





**L**a belaj momentoj ĉiam forte impresas la Ulidojn. Ili tre ŝatas rememori la agrablajn momentojn, la belajn travivaĵojn. Tamen, foje eĉ al ili okazas, ke la aferoj ne disvolviĝas tiel, kiel ili ŝatus... Iun vendredon Sentemulido revenis tre malgaja el la lernejo. La gepatroj demandis al li, kio okazis, sed li apenaŭ povis respondi pro la larmoj, kiuj ne volis ĉesi flui.

 – Mi ne scias kio okazas! Mi ne komprenas kial ni devis adiaŭi Dancemulidino en la lernejo! Mi komprenas nenion! Sed mi scias, ke

mi ne volas, ke ŝi foriru! Ŝi mankos al mi kaj mi scias, ke ankaŭ ni mankos al ŝi! La eta ulido estis nekonsolebla. Li eksciis tiun tagon, ke lia plej bona amikino foriros el la lernejo por ĉiam. La gepatroj vane provis klarigi al li, ke foje en la vivo okazas ŝanĝoj, kiujn neniu antaŭvidis, sed al kiuj tamen ĉiuj devas adaptiĝi. Li restis nekonsolebla. Lia sola deziro estis rehavi la tempon, kiam li senzorge povis amuziĝi kun Dancemulidino, kiam ili ankorau ne sciis, ke ili estos separatitaj. Eble kiel Ely en sia rakonto pri sia forlasota lernejo...




		
<p><b>Ely Leuba:</b> <b>La Granda Ursino</b></p>	<p>Se mi diras “La Granda Ursino”, mi ne parolas pri la konstelacio de Granda Ursino, sed mi parolas pri la lernejo. Ĉu vi ne konas ĝin? Ne estas problemo. Mi klarigas ĉion al vi. Aŭskultu min!</p>	<p>La Granda Ursino estas lernejo en Svislando, en La Chaux-de-Fonds (kiu estas la plej bela urbo ;) almenaŭ por mi...). La Granda Ursino estas tre bela lernejo kaj ĝi estas eĉ la plej bona lernejo kiun mi konas.</p>



Ĉiun vendredon ni havas lernejan kunsidon, kie ni diskutas pri multaj aferoj. Ĝin partoprenas ĉiuj gelernantoj kaj la du gvid-instruistoj. Estas tie, kie ni povas diri ekzemple ankaŭ tion, ĉu ni estas kontentaj pri io aŭ pri iu, aŭ ĝuste ne. Estas tie, kie ni parolas ankaŭ pri diversaj programoj kaj pri organizaj aferoj, kiel ekzemple: kiu devos deĵori la sekvan semajnon en la kafejo, ktp ktp.

Ĉu vi volas scii, kion signifas la deĵorado en la kafejo? Ĉiutage ni havas 30-35 minutojn da paŭzo meze de la antaŭtagmezo (mi ŝatas tiun grandan paŭzon, ĝi estas tre bona ;) ni povas multe ludi ekstere!!!) kaj dum tiu paŭzo du gelernantoj deĵoras en la kafejo: ili preparas la limonadon, ili tranĉas la panon kaj donas ĝin foje kun fromaĝo, foje kun marmelado... mnmjam mnmjam ;)

En unu lernoĵaro ni havas du foje Esperanto-semajnon. Mi vere ŝatas ĝin, ĉar dum tiu semajno ni faras multajn ludojn, bakas kukojn, ni faras skeĉojn per ĉarmaj marionetoj, ĉiuj prezentas iun prelegeton pri sia preferata temo kaj la plej spertaj povas fari eĉ eksperimentojn. Por ĉiu laboro ni ricevas poentojn, kiujn ni povas elspezi kontraŭ belaj, foje amuzaj objektoj dum la aŭkcio, kiu estas vere bonega momento.



La gepatroj provis konsoli Sentemulidon sen mensogoj. Ili montris al li grandan komprenon pri lia ĉagreno, sed ili instruis al li ankaŭ kiel alfronti ĝin: anstataŭ malĝoji, uzu ĉiun minuton kun via amikino kaj rememoru kune ankaŭ viajn belajn aventurojn, kiujn vi kune travivis, por ke vi ambaŭ povu havi ilin en viaj "valizoj de memoroj" por via vivo-vojo.

Kutime en majo nia lernejo havas Malferman Tagon, dum kiu ni kuras ankaŭ Maratonon por gajni monon por nia bela lernejo. Mi tre ŝatas tiun tagon, ĝi estas tre bona kaj en ĉi tiu jaro estis la 40a naskiĝtago de la lernejo.

Por mi La Granda Ursino estas la perfekta lernejo. Mi fartis tre bone en La Granda Ursino. Mi havas mesaĝon por la lernejo: Granda Ursino, mi tre forte amas vin! Dankon por ĉio!



# Verda Cirko

## Unua akto

*[Tri geamikoj parolas surstrate.]*

**Vinjo:** Mi aŭdis, ke Verda Cirko nuligis la hodiaŭan spektaklon en nia vilaĝo.

*[Ŝi suspiras.]*

**Miĉjo:** Jes. Onidire la cirkistoj havas gravajn problemojn.

**Duĉjo:** Tre domaĝe. Por ni tio estus la unuan fojon, kiam ni renkontus internacian teamon de cirkistoj, kiuj parolas nur Esperanton inter si.

**Miĉjo:** Sed kio povis okazi al ili?

**Duĉjo:** Eble ni iru demandi ilin, ĉu ili bezonas nian helpon...

**Vinjo:** Brila ideo! Fakte, ĝuste tial ni lernis Esperanton en nia lernejo: por paroli kun eksterlandanoj, por provi ekamikiĝi kun ili kaj eventuale helpi unuj la aliajn...

**Miĉjo:** Do ni iru al la Granda Parko, kie ili muntis sian verdan tendon. Ek!

*[Ili eliras kurante.]*



## Dua akto

*[En la Granda Parko, apud la tendo de Verda Cirko. La infanoj renkontas tie Klaŭnon, Magiistino kaj Rajdantino. Klaŭno tenas enmane sian kostumon.]*

**Duĉjo:** Hej! Mi neniam vidis tiom malgajan klaŭnon! Kio okazas al vi? Eble ni povus helpi vin!

**Klaŭno:** Kompreneble mi estas malgaja! Jen, mia kostumo rompiĝis dum provludado.

**Vinjo:** Ĉu nur tio estas via problemo? Venu rapide al mi. Mi loĝas vid-al-vide de la parko. Mi kapablas helpi vin. Rapidu, rapidu!

*[Ili eliras kurante. Klaŭno prenas kun si sian kostumon.]*

**Miĉjo:** Kaj vi? Kial vi estas tiom malgaja? Ĉu ankaŭ al vi okazis io malbona?


**Magiistino:** Bedaŭrinde jes. Mi estas Magiistino. Sed kiel mi povos elpreni kuniklojn kaj florojn el mia ĉapelo, se mi perdis ĝin?

**Duĉjo:** Kie vi perdis la ĉapelon?

**Magiistino:** En la trajno, kiam ni alvenis ĉi tien el la apuda vilaĝo.

**Duĉjo:** Bonege! Vi estas tre bonŝanca! Mia onklo laboras en la stacidomo! Li ofte helpas





homojn, kiuj forgesis diversajn aferojn en la vagonoj. Ni iru rapide al la stacidomo. Ek!

*[Ili eliras kurante.]*

**Miĉjo:** Kaj vi? Ĉu ankaŭ vi havas malagrablajn?

**Rajdantino:** Mian ĉevalon timigis iu hundo kaj pro tio ĝi stumblis. Nun doloras ĝin la kruro. Mi estas rajdantino. La bestkuracisto de nia teamo diris, ke la ĉevalo nepre devas pezozi dum semajno kaj ne rajtas porti pezaĵojn. Sed kiel mi dancus kaj transkapiĝus sur ĉevalo, kiu eĉ ne rajtas elteni pli ol 10 kilogramojn? Kaj bedaŭrinde mi pezas 55 kilogramojn...

**Miĉjo:** Hmmm... Atendu momenton! Mi havas ideon. Ĉu via ĉevalo rajtas paŝi?

**Rajdantino:** Jes. Sed ne rapide kaj ne tro longe.

**Miĉjo:** Bonege. Aŭskultu: iru anonci, ke la spektaklo ja okazos! Mi iras hejmen kaj alportos ĉi tien mian papaginion. Ŝi pezas malpli ol unu kilogramon. Ŝi savos la spektaklon!

*[Rajdantino eliras, kurante en la tendon.]*

*Miĉjo eliras en la alian direkton, kurante.]*

## Tria akto

*[La cirka spektaklo.]*

**Klaŭno:** Saluton! Nun vi spektos klasikan dancon. Nur atendu iom, por ke mi surmetu mian kostumon.

*[Aperas Vinjo kun la kostumo. Klaŭno provas surmeti la kostumon, kiu havas pantalonon anstataŭ manikoj. Vinjo donas al li gantojn, kiujn li surmetas anstataŭ ŝrumpojn kaj*

*ŝuojn, kiujn li surmetas anstataŭ gantojn. La infano ridas. Klaŭno dancas valson kaj transkapiĝas. Aplauĉoj.]*

*[Eniras Rajdantino kun sia ĉevalo kiu paŝas ege malrapide ĝis la mezo de la areno kaj haltas. Eniras Miĉjo kun sia papagino kaj metas ŝin sur la selon de la ĉevalo. La papagino diras "Saluton, geamikoj!" Aŭdiĝas muziko. La papagino dancas. Poste la papagino fajfas melodion. Aplauĉoj.]*

**Magiistino:** Kaj nun, mi prezentos al vi magiaĵojn. Ho, sed mi ankoraŭ ne havas mian ĉapelon. Bonvolu alvoki ĝin. Kriu: "Ĉapelo! Ĉapelo!"

**Publiko:** Ĉapelo! Ĉapelo!

*[Eniras Duĉjo kun la ĉapelo.]*

**Magiistino:** Dankon! Ĉu vi volas, ke la ĉapelo venigu kuniklon?

**Publiko:** Jes!

**Magiistino:** Do, alvoku ĝin!

**Publiko:** Kuniklo!

**Magiistino:** Hmmm... La kuniklo ne aperis. Sed jen, ĝi skribis al ni leteron: "Saluton, geamikoj! Mi ferias dum kelkaj tagoj kune kun mia familio. Sed mi sendas al vi bombonojn."

**Magiistino:** Nun atendu pacience, ĉar en la ĉapelo estas sufiĉe da bombonoj por ĉiuj. *[Duĉjo helpas la magiistinon elpreni la bombonojn el la ĉapelo kaj disdoni ilin, dum la infanoj adiaŭas la cirkistojn.]*

José de J. Campos  
Pacheco (Kubo) kaj Luiza  
Carol (Israelo). Bildoj:  
Odelvis del Sol (Kubo)





# Kiel la diablo nevole kreis dezerton en Eŭropo

**Ĉu vi sciis, ke ankaŭ Eŭropo havas sian dezerton? Veran dezerton kun amaso da sablo?**

**G**i kompreneble ne estas tiom granda, kiel la afrika Saharo aŭ la Granda Dezerto en Aŭstralio, sed la fakto, ke ankaŭ en Eŭropo ekzistas sabla dezerto, ja estas interesaĵo, ĉu ne?

Ekzistas du klarigoj, kiel estiĝis tiu dezerto en suda Pollando: unu scienca klarigo, kaj unu pli populara klarigo. La scienca (kaj malpli spektakla) klarigo estas tiu-ĉi: la dezerto estiĝis dum la lasta glaciepoko, pro tiamaj geologiaj okazintaĵoj. La dua klarigo estas pli interesa: laŭ la legendo estis la diablo mem, kiu nevole kreis la dezerton! Kaj jen kiel tio laŭdire okazis: en la regiono, kie hodiaŭ troviĝas la dezerto, la diablo iam havis siajn subterajn metiejon kaj riĉaĵojn. Sed iam okazis, ke la enloĝantoj de la tiea urbo Olkusz hazarde trovis grandan, subteran kuŝejon de arĝento. La enloĝantoj de Olkusz tuj konstruis minejon kaj kompreneble tuj ekelminigis la arĝenton. La urbo Olkusz pli kaj pli riĉiĝis. Sed tiu kuŝejo de arĝento ja estis parto de la subtera riĉaĵejo de la diablo, kaj ju pli la urbo riĉiĝis, des pli malriĉa fariĝis la diablo. Li do pripensadis kaj repripensadis, kion li povas fari por ĉesigi la ekspluatadon

de sia arĝento. Kaj jen li havis ideon: li nur devas plensuti la minejon per sablo kaj tiamaniere malfunkciigi ĝin! Sed de kie li prenu tiom da sablo en mezeŭropa altebenaĵo? Kaj ankaŭ ĉifoje la diablo trovis solvon: kiel diablo li ja kapablas flugi, kaj li do nur devas preni grandegan sakon, flugi al maro, plenigi la sakon per tiom da sablo kiel eble, flugi reen – kaj elverŝi la tutan sablon super la minejo! Kaj jen, li flugis al Balta Maro, plenigis grandegan sakon per tiom da sablo, ke li apenaŭ kapablus levi ĝin, kaj flugis kun la plenigita sako reen al sudo de Pollando. Kiam li jam estis super la urbo Olkusz kaj jam vidis la arĝento-minejon, li per la sako da sablo nevole tuŝetis la spajron\* de la Olkusza preĝejo – kaj, per helpo de la vento, la sablo elverŝiĝis en ĉiujn direktojn kaj tiel kovris la tutan regionon. Nur en la direkton, kie troviĝis la minejo, la sablo ne flugis, ĉar de tie ja venis la vento. Kaj tiel la minejo daŭrigis ekspluatadi la arĝenton de la diablo, la urbo Olkusz riĉiĝis pli kaj pli, kaj en la nordo de Olkusz estiĝis sabla dezerto – la plej granda en Eŭropo!

Arĝenton oni en Olkusz ne plu ekspluatadas, ĉar oni jam antaŭ longe elekspluatitis la riĉaĵojn de la diablo. Sed la dezerto, kiu havas la nomon Błędowska (laŭ la pola vorto por “vagadi”), danke al diabla mal-lertuleco ĝis hodiaŭ ekzistas kaj estas granda kaj bela atrakcio en suda Pollando.

**Martin Ptasieński**



Preĝejo en Olkusz.



En la pola dezerto.

\*) Spajro: tur-pinto de kristana preĝejo.



## Legu kaj ĝuu

Rubrikestro:

Małgosia Komarnicka

Pollando

*malgosia.junaamiko@gmail.com*



## Proksimiĝas nova jaro 2024...

Ĉiam fine de la jaro mi rekomendas al vi skribi planojn, celojn, revojn, kiujn vi deziras plenumi en nova jaro kaj mi ankaŭ rekomendas libron, kiun valoras tralegi. Ĉi-foje mi enkondukos iom da ŝanĝoj...

**U**nue, tralegu mian intervjuon kun Enrico Borrello, itala esperantisto, kiu zorgas pri esperantaĵoj en Nacia Biblioteko de Esperanto en Massa. Mi estas ravita, observante lian penan volontulan laboron kaj sincere konfesas, ke unuafoje mi ekvidis tiom multe da esperantaĵoj kaj tiel belege kaj profesie ordigitaj...



Due, tralegu mal-longan historion de Esperanto, kiun mi preparis – kaj informojn pri Esperanta flago, kiujn preparis Cristina Bolini (fine de la rubriko vi trovos informon, kie vi povas aĉeti ŝian libron).

Trie, finante la rubrikon, mi preparis surprizon, ĉinajn legendojn, kiujn tradukis ĉina esperantisto Minosun.

Kvare, neniam forgesu, ke amo al legado estas donaco por la tuta vivo.

Mi havas ankoraŭ kvinan punkton... Antaŭ ol vi komencos legi, sendu pozitivan energion al Stano Marček, al la ĉef-redaktoro de nia revuo "Juna Amiko". Li decembre 2013 komencis redakti nian revuon kaj do ĉi tiu decembra numero estas por li jubilea. Li festas 10 jarojn de la laboro por "Juna Amiko". Multe da sano kaj forto por sekvaj jaroj!



# Intervjuo kun Enrico Gaetano Borrello

**Maĝosia:** Mi de multaj jaroj klopodas instigi la legantojn de nia revuo, “Juna Amiko” legi, legi kaj legi pere de la rubriko “Legu kaj Ĝuu”. Ne nur librojn, sed ankaŭ gazetojn, revuojn... Ne nur paperajn, sed ankaŭ ciferajn. Ĉu vi konsentas kun mi, ke legado donas scion kaj sukceson kaj estas unika investo, kiu alportos nur gajnon?

**Enrico:** Kompreneble, ke jes.

**Maĝosia:** Karaj legantoj, mi prezentas al vi italan esperantiston Enrico Gaetano Borrello, kiun mi ekkonis kadre de la eŭropa programo Erasmus+. La programon mi realigas kun pola grupo en Italio, en bela Toskanio, en belega urbo Massa, kie troviĝas Nacia Biblioteko de Esperanto kaj pri biblioteko mi deziras konversacii.

**Maĝosia:** Enriko, vi okupiĝas pri Esperanta biblioteko en Massa. Ĉu vi povas proksimigi ĝian historion al niaj legantoj?

**Enrico:** Jes, mi tre feliĉe volontulas ĉe la Nacia Esperanto Biblioteko en Massa. Ĝi havas sufiĉe longan historion, kiu devenas de la kvindekaj jaroj de la dudeka jarcento. La gefratoj Catina kaj Mario Dazzini el Massa iniciatis la kolekton de libroj kaj revuoj, kiujn ili aĉetis aŭ ricevis kiel donacojn dum multegaj internaciaj kongresoj kaj eventoj, en kiuj ili partoprenis dum sia tuta vivo; ankaŭ multajn esperantistoj donacis siajn

librojn. La biblioteko unue fondiĝis en la hejmo de la gefratoj, sed post iom da tempo ĝi fariĝis impona kaj grava por la urbo, do la Komunumo de Massa gastigis ĝin en la Kastelo Malaspina, sur monteto apud la urbo. Poste, la Itala Esperanta Federacio (FEI) ricevis la bibliotekon kaj klopodis transdoni ĝin al la Itala Ŝtato, kondiĉe, ke ĝi restu en Massa. Fine la itala ŝtato akceptis la donacon kaj aldonis ĝin al la Ŝtata Arkivo en Massa.

**Maĝosia:** Tio signifas, ke la biblioteko naskiĝis en Massa kaj daŭre estas en Massa – kaj nuntempe estas unu el la plej gravaj lokoj de nia Esperanta heredaĵo, ne nur en Italio, ĉu?

**Enrico:** Jes, ekzakte. Por Massa la biblioteko estas grava kultura heredaĵo, kiu donas al nia urbo specialan kaj unikan internacian etoson. Des pli ĝi estas grava heredaĵo por la Esperanta kulturo en Italio kaj eksterlande.

**Maĝosia:** Vizitante la bibliotekon mi vidis multegajn librojn, revuojn, sed ankaŭ fotojn, korespondaĵojn, diversajn dokumentojn... – Ĉio troviĝas en du grandegaj ĉambroj. De kie devenas tiom multe da “eksponaĵoj”? Mi scias, ke ne ĉiuj estas katalogataj...





**Enrico:** La gefratoj Dazzini kolektis multajn esperantaĵojn dum sia vivo; ili ankaŭ ricevis tekojn de leteroj de aliaj esperantistoj; plie ili direktis italajn kaj internaciajn asociojn, do ili konservis la multajn dokumentojn. Certe vi scias ke la reordigo kaj katalogado de leteroj kaj esperantaĵoj, kiuj ne estas libroj kaj revuoj, estas malfacila kaj temporaba laboro, kiun ĝis nun neniu kapablis fari en Massa. Mi esperas, ke aperos projektoj, kiuj helpos en tiu laboro...

**Maĝosia:** Vi de multaj jaroj katalogas Esperantajn "eksponaĵojn" en la Biblioteko en Massa. Vi laboras kiel volontulo kaj la laboro postulas multege da tempo kaj ankaŭ specifan bibliotekan scion. Observante vin, mi admiras vian penan kaj profesie plenumatan laboron. Ĉu vi profesie estas bibliotekisto?

**Enrico:** Ne, mi lernis kaj laboris en la sektoro de la konstruaĵoj dum multaj jaroj, ĝis la jaro 1990 en Pisa, eksterlande dum pli ol du jaroj kaj fine en La Spezia; poste mi ŝanĝis labor-sektoron kaj alvenis al Massa, por labori kiel ŝtata oficisto pri impostoj ĝis la jaro 2012, kiam mi emeritiĝis. Sed mi ĉiam ŝatis librojn kaj

Esperanton, do post la emeritiĝo mi trovis iom pli da tempo por zorgi pri la biblioteko. Iom post iom mi mem lernis katalogi la librojn. Min malĝojigis la biblioteka situacio, ke ni havas milojn da libroj kaj neniu scias iliajn titolojn ktp. Kiam mi iniciatis la katalogadon, jam estis farita de profesiuloj la katalogo de ĉirkaŭ 7.000 libroj. Tiun laboron, bonŝance, financis la Regiono Toskanio, komprenante gravecon de la biblioteka kolekto por nia urbo.

**Maĝosia:** Multaj personoj pensas, ke la laboro en biblioteko estas enua. Kaj kion vi pensas?

**Enrico:** La personoj, kiuj pensas tiel, laŭ mi, ne tre ŝatas legi kaj ĝui la legadon. Ili ne scias, ke ili perdas multajn tre valorajn spertojn.

**Maĝosia:** Kiel komenciĝis via aventuro kun libroj? Vi certe devas multe legi, ĉu ne?

**Enrico:** Mia pasio por libroj devenas de la periodo multe pli frua antaŭ ol mia renkontiĝo kun Esperanto. Mi memoras, ke jam dum la unua jaro de lernado, kiam mi havis nur ses jarojn, mi klopodis legi dekunu voluman enciklopedion, kiu estis

en mia hejmo. La pasio por la legado akompanas mian tutan vivon, do ankaŭ la pasio por libroj. Nuntempe, ankoraŭ mi preferas pli la paperajn librojn ol la elektronikajn.

**Maĝosia:** Kiajn ecojn (atributojn) devas posedi bona bibliotekisto laŭ vi?

**Enrico:** Mi ne estas profesia bibliotekisto, sed nur pasiulo. Mi pensas, ke bona bibliotekisto devas unue ŝati librojn kaj







revuojn, poste li aŭ ŝi devas esti preciza kaj pacienca; plie, hodiaŭ, oni devas koni bone la komputilan laboron kaj la interesajn eblecojn. Plie, por zorgi pri Esperanta biblioteko, oni devas koni bone la lingvon.

**Maĝosia:** Kion vi ŝatas kaj kion vi ne ŝatas en via “biblioteka” laboro?

**Enrico:** En mia volontula laboro en la Esperanta Biblioteko mi ŝatas vidi la verkojn, kiuj alvenas de ĉiuj partoj de la mondo, ekkoni malsamajn vidpunktojn de la mondo, ekscii pri diversaj okazintaĵoj kaj kion faris la lokaj esperantistoj. Minuso estas nur unu, manko de tempo...

**Maĝosia:** Bonvolu priskribi vian tipan labortagon.

**Enrico:** Mi kutime en la biblioteko laboras nun kelkajn horojn, posttagmeze, unu-foje semajne. Unue mi prenas la ŝlosilojn al la salonoj, kie troviĝas la esperantaĵoj kaj la revuoj, kiuj intertempe alvenis. Poste mi metas en la korektan pozicion en la ŝrankojn la librojn, kiujn hejme mi katalogis kaj etikedis. Poste mi serĉas librojn, kiujn mi devas relokigi korekte, aŭ mi preparas librojn ankoraŭ ne katalogitajn, por preni ilin hejmen kaj komputile katalogi. Ofte mi ankaŭ serĉas por lernantoj aŭ verkistoj diversajn informojn.

**Maĝosia:** Nuna demando certe estos naiva, post kiam mi jam scias kiel aspektas via labortago, sed mi kuraĝas starigi ĝin... Ĉu vi travivis iun amuzan historion en tiu laboro?

**Enrico:** Mi ĉiam amuziĝas, kiam mi volontulas tie, en la biblioteko, alimaniere mi ne donus mian tempon al ĝi. Mi ne konas ĉiujn librojn aŭ revuojn, kiuj troviĝas en la biblioteko, do mi ĉiam ĝojas, kiam mi eltrovas libron, kiu speciale interesas min.



**Maĝosia:** Kion vi nun legas? Kion vi rekomendus al niaj legantoj?

**Enrico:** Kompreneble mi ne legas nur esperantlingvajn librojn; mi ŝatas la historiajn, eseojn kaj rakontojn. Esperante freŝdate mi finlegis libron pri la ekstermado en Kampuĉio pere de Pol Pot (“Kampuĉio – La nigraj jaroj”, de Vu Kan, Hoang Nguyen, lokita en la biblioteko en sektoron “900 – Historio kaj Geografio”, n. 246) kaj aliajn pri la sovetaj aŭ naziaj koncentrejoj; mi volonte legas ankaŭ eseojn pri interlingvistiko kaj pri propedeŭtika valoro de Esperanto por la lernado de aliaj lingvoj.

Mi rekomendas legi librojn laŭ la kulturaj interesoj, romanojn aŭ eseojn. Kompreneble oni devas elekti librojn, kiuj estas skribitaj per bona lingvo, por praktiki kaj ĝui la legadon.

**Maĝosia:** Kion vi konsilus al persono, kiu pripensas fariĝi bibliotekisto, kompreneble el via vidpunkto?

**Enrico:** Kiel mi pli frue diris, tiun personon devas karakterizi amo por libroj kaj kulturo. Poste oni devas lerni katalogadon kaj la uzadon de komputiloj – tio estas necesa hodiaŭ.

**Maĝosia:** Ĉu vi ordigas bibliotekajn kolektojn laŭ speciala sistemo? Mi demandas, ĉar konforme al nuna modo, hejme oni rekomendas ordigi niajn librajn kolektojn laŭ grandeco aŭ koloro. En biblioteko tiel fari absolute ne eblas, ĉu ne?



**Enrico:** Jes, la pli uzata sistemo de ordigo de libroj estas la “Dewey - Dekuma Sistemo”. En la Biblioteko de Massa ni havas dek ĉefajn grupojn de ŝrankoj, laŭ la Dewey-Sistemo; ekzemple, la grupo “000” enhavas la ĝeneralaĵojn, kiel kongresajn kajerojn, jarlibrojn, bibliografiojn, adresarojn; en la ŝrankoj “100” estas libroj pri filozofio; la pli granda grupo, en nia biblioteko estas numero “800”, kie oni enmetas romanojn, poemojn kaj similajn: ni jam havas pli ol 2.400 titolojn en tiu grupo.

En la redaktado de la bibliografia slipo de la libro, kompreneble, oni devas aldoni pli precizan klasifikadon de ĉiu verko: ekzemple, Esperanta originala romano estas klasifikata sub la numero “899” kaj do ĝi estas “literaturo en lingvo Esperanto”. Por fari tion, la bibliotekisto devas bone kompreni “la enhavon de la libro” kaj do foliumi ĝin kaj legi la liston de la enhavtabelo; povas okazi, ke la unua klasifiko ne estas evidenta...

Mi pensas, ke la ordigo nur laŭ koloro aŭ grandeco de la libro ne estas tre utila; oni povas fari tion, kiam oni ekordigas grandan kvanton da libroj, sed kiam alvenas sekvaj libroj, oni devas jam aldoni

ilin laŭ kreskanta numerado, kaj ne pensi pri koloro ktp.

**Maĝosia:** Vi certe rimarkis, ke nuntempe librojn legas ĉiam malpli da personoj... Ĉu do bibliotekoj havas estontecon?

**Enrico:** Mi pensas, ke bibliotekoj havos estontecon, sed se oni aldonos al la paperaj libroj pli kaj pli la elektronikajn versiojn. Do multe pli da homoj povos legi librojn sen neceso de fizika vizito al la biblioteko kaj preni mane la librojn.

Por la Esperanta movado bibliotekoj kaj arkivoj estas tre gravaj, ĉar ili konservas eble ĉion pri Esperanto en ĉiu lando kaj ekz. la Esperanta Muzeo kaj Biblioteko en Vieno pri la tuta mondo. Do lernantoj aŭ esploristoj pri Esperanta historio kaj kulturo povas labori en unikaj lokoj, sen irado de urbo al urbo por serĉi en lokaj Esperanto-grupoj materialojn por siaj studoj.

**Maĝosia:** Mi kore dankas al vi pro viaj respondoj. Ĉi-okaze mi ankaŭ kore dankas al vi pro lernado, kiun mi kadre de la Erasmus-programo gajnis, vizitante la Bibliotekon en Massa.

Mi kore dankas pro viaj indikoj, klarigoj,

konsiloj, sugestoj, helpo... Mi ellernis, ke biblioteko ne nur estas loko de kolekto de libroj kaj scio, sed ĝi ankaŭ disvolvas pensadon, instruas nin entrepreni decidojn, respondecon pri libroj, perfektigon de niaj scipovoj, strebadon al propra evoluo...

Oni povas diri, ke biblioteko estas sanktejo de libroj kaj ne nur... Kaj amo al legado estas donaco por la tuta vivo...





# Esperanto kaj ĝia flago

La 26-an de julio 1887, en Varsovio ĉe la strato Nowolipie 11, estis eldonita la unua lernolibro de Esperanto “La Internacia lingvo. Antaŭparolo kaj plena lernolibro”. Estis eldonitaj 3 mil ekzempleroj. Ludoviko Zamenhof skribis la lernolibron sub la kaŝnomo: “doktoro Esperanto”. Tiu lernolibro nomata “La Unua Libro”, estis eldonita en malgranda formo, por facile dissendi ĝin per poŝto en la tuta mondo.

La aŭtoro en la antaŭparolo skribis: „La tutan gramatikon de mia lingvo oni povas ellerni en la daŭro de unu horo.” Per sia eltrovaĵo Zamenhof elvokis admiron kaj mirkonsternon de lingvistoj. La unua el ili estis la mondfama lingvosciencisto, ankaŭ varsoviano, Jan Niecisław Baudouin de Courtenay.

Esperanto ebligas transdoni ĉiujn nuancojn de la homa penso, kion atestas miloj da sciencaj kaj literaturaj publikajoj. Ĝi estas ne nur facila kaj neŭtrala lingvo, sed ankaŭ belega ideo de frateco kaj de solidareco inter nacioj.

La ideo de Zamenhof vekis kaj vekas ĉe ĉiuj homoj, al kiuj estas proksima universala frateco, naturan kaj spontan simpatian. Esperanto do, sen jura helpo, financaj rimedoj aŭ aŭspicioj de ia ajn lando, scipovis travivi jam 136 jarojn. Dum la sama tempo en la mondo pereis kelkcent lingvoj.

La 31-an de oktobro 2014 la internacia lingvo Esperanto estis enskribita de la pola ministrino de Kulturo kaj Nacia Heredaĵo – prof. dr. hab. Małgorzata Omilanowska, en Polan Liston de Nemateria Kultura Heredaĵo, kiel portilo de la Esperanta Kulturo.

Oni ne povas travidi, ĉu Esperanto estos komune agnoskita kiel la internacia

lingvo, sed ĝi ĉiumomente povas plenumi tiun rolon, ĉar ĝi estis por tio kreita. Valoras tamen lerni ĝin jam nun pro eksterduba valoro kaj profito, kiun ĝi donas.

Elstara pola filozofo prof. Tadeusz Kotarbiński diris: “Esperanto estas la plej genia kunligo de logiko kaj simpleco”.

## Flago de Esperantujo

Jen nia flago, nia “Verda Stelo”, kiu estas nia simbolo, la sama flago por ĉiuj esperantistoj en la tuta mondo.

Nia flago estas verda (simbolo de Espero), kun blanka kvadrato (blanka estas la tradicia koloro de la paco). La kvinpinta verda stelo reprezentas la kvin kontinentojn.



Ni havas ankaŭ alian simbolon: la “Jubilean”, kiu konsistas el la kunmeto de du literoj “E”, unu latina, la alia cirila.



Estas aliaj Esperantaj simboloj, kiuj estas uzataj fare de multaj Esperantaj asocioj, sed la komuna elemento estas ĉiam la “verda stelo”.

Okaze de la venonta Universala Kongreso, eĉ se ni ne povas persone partopreni, ni ĉiuj povus alpingli al la ĉemizo la verdan stelon aŭ flagpinglon.

Ĉi tiu simpla gesto unuigos nin en la tuta mondo, sub la ununura flago de Esperantujo.



# Ĉinaj legendoj

## Esperantlingva re-rakonto fare de Minosun\*

### Nüwa [Njuŭa] flikis la ĉielon

La diino Nüwa knedis el argilo bebojn, kaj poste enmetis en ilin spiriton. Tiamaniere ŝi kreis la homan genton. Ili reproduktiĝis kaj multiĝis kaj vivis feliĉan vivon.

Sed tia vivo daŭris ne longe. En unu jaro la fajra dio Zhurong [Ĝufong] kaj la akva dio Gonggong militis unu kontraŭ la alia. Gonggong faligis sur la monto Buzhou [Buĝoŭ] la kolosan kolonon, kiu subtenis la ĉielon. Duono de la ĉielo defalis, tiel ke sur la tero trovis sin multaj truoj kaj fendoj. La Ĉiela Rivero (la Lakta Vojo) likis senhalte kaj torente, kaj regis do diluvo sur la tero. Kia granda tragiko!

Por savi la homojn de la inundego, Nüwa decidis fliki la ĉielon per la kolektitaj rokoj kvinkoloraj kaj apogis ĝin per la kvar piedoj de la dia testudo el la orienta maro. La flikado preskaŭ estis finita, ho ve, tiam ŝi trovis, ke tiaj kvinkoloraj rokoj ne sufiĉas: nur unu truo restis ankoraŭ ne riparita. Kion fari?

Mizerikorda Nüwa havis nenian alternativon alian krom fliki la truon per sia propra korpo. La ĉielo retrovis la originan aspekton, kaj sur ĝi aperis kvinkoloraj nuboj, sub kiuj ĉiuj vivantaj estaĵoj vivis en paco kaj senzorgeco.

### Sunojn arkpafis Houyi [Hoŭji]

Houyi naskiĝis arkpafanto. Kiam li grandiĝis, li havis diajn fortajn brakojn, kaj lia pafarto estis senkompara. Tiam dek sunoj montris sin sur la ĉielo, kaj ili tiom brulis, ke la tero estis karbigita, polviĝis la ŝtonoj, la kultivatajn plantojn turmentis sekegeco kaj bolis la maro.

En la ardaĵ sunradioj oni apenaŭ spiris. La arkpafanto kompatis la popolon, kiun tre suferigis la varmego, supreniris sur altaĵon kaj tie, streĉante arkon, pafis en la aeron. En tiu momento oni aŭdis tondran bruegon: unu suno flamante eksplodis en pecojn. Tiel Houyi pafis sinsekve naŭ fojojn, naŭ sunoj falis unu post alia. Li lasis la lastan. La heroo pensis, ke sen ajna suno estus mallume kaj malvarmege sur la tero. "Nur unu suno estas bona kaj sufiĉa, kaj tio estas beno por la homo," al si li diris en la menso. De tiam la homa mondo havas nur unu sunon, kaj danke al ĝi estas feliĉa la tero, sur kiu la homoj vivas.

### Pangu kreis la mondon

Pratempe, kiam ekzistis sur la tero neniam vivantaj estaĵoj, la tero kaj la ĉielo estis en unu tuto intermiksita. En tiu miksaĵo Pangu gravediĝis dekok mil jarojn. Kiam li vekigiĝis, la ĥaŝon li hakis en du partojn: la unua, super lia kapo, ricevis la nomon Ĉielo; la alia, sub liaj piedoj, la nomon Tero. Sed li ne ĉesigis sian miraklan laboron: li levis kaj levis la ĉielon, ĝis ĝi atingis la zeniton kaj la distanco inter la ĉielo kaj la tero estis sufiĉe granda. Pangu estis tiel laca de la laboro, ke li mortis en sia kreado de la mondo.

Dum Pangu baraktis en agonio, lia spiro aliĝis en printempan venton por la tero kaj en nubojn en la ĉielo; la voĉo en tondrojn, la maldekstra okulo en la sunon, la dekstra en la lunon, la haroj en brilajn stelojn, la sango en riverojn kaj marojn, la karno en vastajn fruktodonajn kampojn, la ostoj en arbojn kaj herbojn, la vejnoj en vojojn, dentoj en ŝtonojn kaj metalojn, la ŝvitaj en pluvon kaj roson. Post lia morto, liaj kapo kaj kvar membroj ŝanĝiĝis al kvin grandaj montoj.

\*) Minosun estas ĉina emerito, elstara esperantlingva poeto, prozisto kaj tradukisto. Lia ĉina nomo: Xiong Linping [Ŝjiong Linping], kies signifo estas "Pacarbara Pando". En Ĉina Radio Internacia (ĈRI) li laboris 11 jarojn. Li lanĉis la rubrikon "Kampo de Literaturo" kaj respondicis pri ĝi. Nun li ankoraŭ part-tempe laboras por ĈRI kaj kelkfoje por la revuo "El Popola Ĉinio". Li estas ano de la konsilantaro de Ĉina Esperanto-Ligo.



# Toskanio de la kuirarta flanko

La ĉeesto de arbaroj, valoj, la Liguria kaj Tirena maroj kaŭzas, ke la regiona kuirarto de Toskanio enhavas multajn interesajn kuriozaĵojn kaj proponas multajn diferencajn kuirartajn receptojn.

**L**a radikojn de tiu kuirarto oni devas serĉi jam en la etruska epoko kaj sekve en la mezepoko.

La toskana teritorio estis socie dividita. La plej malriĉa grupo estis kamparanoj. Malriĉeco ne permesis al ili havi multe da elekto en manĝaĵo. Oni manĝis tion, kio estis laŭsezzone kreskigita, t.e. multajn specojn de legomoj. Ĉasaĵo kaj aliaj viandoj iris al la tabloj de la riĉuloj, kaj la restaĵoj iris al la plej malriĉaj.

Toskanio havas tre interesan kulinaran historion. Sennombraj libroj estis verkitaĵoj pri ĉi tiu temo. Tutjare, kuirartaj festivaloj (*sagre*) okazas tra la regiono, allogante multajn frandemulojn, ne nur italajn, sed ankaŭ eksterlandajn.

Festi manĝaĵojn estas unu el la plej gravaj agadoj de italoj. Ĝuste en Italio naskiĝis la movado "Slow Food", kuraĝigante homojn manĝi kaj prepari manĝaĵojn malrapide, defendi la tradiciojn de regionaj kuirartoj, rekomendante aŭtentikajn pladojn kaj vinojn kaj ankaŭ regionan olivoleon.

Unu el la plej gravaj produktoj de toskana kuirarto estas **pano**. Ĝia karakterizaĵo estas la manko de salo. Ĉi tio devenas el la malnovaj tempoj, kiam kamparanoj estis tro malriĉaj por aĉeti ĉi tiun valoran mineralon. Pano estas manĝata ĉie kaj laŭvorte kun ĉio (ĉiam estas deviga sur la tablo). En Toskanio oni nomas *fettunta* pecon da pano, verŝita per olivoleo kaj surŝutita per salo, oni povas manĝi ankaŭ pecetojn de pano kun eroj da tomato, "guto" da olivoleo kaj peceto da



Toskana pano.

salo. *Crostini* kun hepata maso estas farita el hakita longa bulko. En toskana kuirarto oni ne forĵetas panon. Eĉ kiam ĝi estas malfreŝa, ĝi estas uzata por pladoj kiel: *pappa al pomodoro*, *ribollita*, *panzanella*, *acquacotta*, ktp.

Manĝeblaj **kaŝtanoj** estas rikoltitaj en la **montoj** aŭtune. En la pasinteco, ili estis la manĝaĵo de multaj generacioj de homoj vivantaj en la montoj. Tial kaŝtanoj estis nomitaj "la pano de la malriĉuloj". Kaŝtanoj estas boligataj (*ballotti*), bakitaj en la forno (*frugiate*) aŭ en specialaj, tradiciaj patoj. El la kaŝtana faruno ankaŭ estas preparataj *necci* krespoj kaj *baki castagnaccio* kun sekvinberoj kaj rosmareno.

**En la arbaroj**, krom fungoj kaj arbarfruktoj, troviĝas ankaŭ la famaj trufoj (subteraj fungoj). Ili estas rikoltitaj aŭ en Marto, aŭ iom poste, en aŭtuno. La plej popularaj fungoj estas noblaj boletoj.



Kelkfoje ili estas tiel grandaj, ke supo povas esti farita el nur unu ekzemplero. Iliaodoro estas tiel intensa, ke estas neeble ignori la standon ĉe la urba merkato. La plej popularaj pladoj estas *tagliatelle* aŭ *pappardelle ai funghi porcini* aŭ *risotto*. Indas aldoni, ke estas multe da ĉasado en Toskanio, do estas ankaŭ ĉasaj pladoj.

Toskana kuirarto devas inkluzivi fiŝajn pladojn. La plej bonaj estas kompreneble tiuj faritaj el freŝaj fiŝoj: *cacciucco*, *frittura di mare*, *spaghetti allo scoglio*, ktp. En marbordaj urboj, kelkaj fiŝkaptistoj vendas fiŝojn en la haveno tuj post fiŝkaptado. Kaj en Viareggio estas kunsko, vendanta frititajn *frutti di mare* kun moruoj, servataj en papera korneto.

En la sekva parto mi priskribos vinberejojn, oliv-arbetarojn, frandaĵojn...

Aleksandra Seghi

\*\*\*\*\*

Aleksandra Seghi estas italistino, ĵurnalisto, redaktorino de la portalo "Poloj en Italio" ([www.polacywewloszech.com](http://www.polacywewloszech.com)). Ŝi kunlaboras kun polaj gazetoj, por kiuj ŝi verkas artikolojn pri toskana aŭ itala kuirarto. Ŝi estas la aŭtorino de dek libroj pri italaj temoj, precipe toskanaj. Ŝi skribas en sia kuirarta kaj vojaĝa blogo "Moja Toskania" ([www.aleksandrasedghi.com](http://www.aleksandrasedghi.com)) dum 13 jaroj. Ŝi estas tradukistino, organizas vojaĝajn kaj kuirartajn renkontiĝojn kaj kuirlaboresiojn en Toskanio.



Volvado de patkuko.



Legomoj en toskana foiro.



**PLEJ LASTAJMENA AMIKOJ**

**Teraso Mascagni en Livorno**  
 Aĉista de Aleksandra Seghi la 3-an de novembro 2023 en Mia Toskanio | 0 komentoj  
 Unu el la plej belaj observferdejoj en Italio estas la Teraso Mascagni. Kaj ne temas nur pri...

**Itala Skermado-Konkurado en Montecatini Terme**  
 Aĉista de Aleksandra Seghi la 3-an de novembro 2023 en Mia Toskanio | 0 komentoj  
 Ĉi-semajnfine okazis en Montecatini Terme la Nacia Skermado-Konkurado. Ĝis nun mi havis la plezuron...

**Intervjuo kun mi. Serio de artikoloj titolita VIRINOJ KUN ĈAPITALO F. POLAJ VIRINOJ EN ITALIO NE ĈIAM SUNOJ.**  
 Aĉista de Aleksandra Seghi la 4-an de novembro 2023 en Moja Toskanio. Moja Toskanio en radio kaj televido | 0 komentoj  
 Hieraŭ mi publikigis intervjuon malfermantan serion da artikoloj de ĵurnalisto Ewa Trzcńska titolita...

**Toskanio sub akvo**  
 Aĉista de Aleksandra Seghi la 3-an de novembro 2023 en Mia Toskanio | 0 komentoj  
 Karaj amikoj, Hieraŭ ni havis la plej malbonan pluvan tagon. Areoj: Fiorenco/Prato/Pistoia kaj poste...



Rubrikestro:  
Elena Nadikova,  
la gvidantino  
de Esperanto-klubo  
“Betuleto”, Rusio.  
*lena\_esperto@mail.ru*



## “Miaj interkulturaj spertoj”

### Saluton, karaj legantoj!

Po-iome finiĝas la kuranta 2023-a jaro. Ĝi estis plena je diversaj eventoj kaj, certe, ili fiksiĝos en nia memoro.

**P**or ILEI – Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj – ĝi estis aparte signifa. Unue, finfine okazis la ĉeesta kongreso – post la 3-jara paŭzo. Due, 2023 estas la jaro de grava jubileo – la 50-jariĝo de nia revuo *Juna Amiko*.

Ĉiuj esperantistoj konas tiun periodaĵon. Iuj lernis Esperanton danke al ĝi. Aliaj simple ŝatas ĝin kiel interesan legaĵon, disvastigantan la plej sukcesan internacian lingvon.

Por atingi tiujn du celojn laboras granda amika teamo de kunlaborantoj. Gvidas ilin nia ĉefredaktoro Stano Marček. Li estas ne nur sperta redaktoro, sed ankaŭ ĵurnalisto, eldonisto, instruisto, muzikisto kaj aŭtoro de unu el la plej famaj lernolibroj *Esperanto per rekta metodo*, kiu jam aperis en 45 lingvoj. Kaj ankaŭ tre agrabla homo kaj interesa rakontanto.

Ĉi-jare nia kara redaktoro ankaŭ havas jubileon – kune kun sia fama “ido”: 2023 estas la 10-a jaro de lia ĉefrola laboro en *Juna Amiko*. **Ni sincere gratulas al Stano kaj deziras al li sanon kaj plian 10-jaran gvidadon de nia “juvelo”!**

Sur la sekvaj du bildoj estas la unuaj numeroj de *Juna Amiko*, redaktitaj de Stano Marček kaj aperintaj antaŭ 10 jaroj:



*Juna Amiko* jam faris serion da materialoj pri sia ĉefredaktoro (vidu la numerojn 2-kaj 3/2023). Stano detale rakontis pri sia Esperanto-vivo, pri la eldona laboro, pri sia instru-metodo kaj aliaj gravaj temoj. Por finfesti la du jubileojn, ni decidis dediĉi la lastan numeron al pli amuzaj rakontoj. Ja nia rubriko nomiĝas *Interkultura Mondo* kaj ĝi strebas informi pri komunikado pere de Esperanto. Do, jen estas la dua intervjuo kun Stano Marček.

**Elena:** Saluton, kara Stano! Ni jam scias pri la romantika historio de via konatiĝo kun Esperanto (amo al samklasanino). Kun kiu vi unuafoje ekparolis en ĝi praktike?

**Stano:** Kiel menciite, mi komencis lerni Esperanton en la baza lernejo, en Esperanto-rondeto, kiun gvidis ĝia vicdirektoro Ŝtefan Ŝpigúth. Do miaj unuaj konversacioj en Esperanto okazis kun li kaj kun la aliaj kursanoj. Kelkfoje





mi vizitis kun miaj samkursanoj el baza lernejo renkontiĝojn de esperantistoj en la slovak banloko Dudince, kiujn organizis Ernesto Váňa (sur la foto mi kun gitaro kaj apud mi “ŝi”), poste en Someraj Esperanto-Lernejoj en Poprad kaj Košice (Slovakio), kiujn organizis Milan Zvara. Mi ĉeestis ankaŭ kelkajn E-kursojn en Somera Esperanto-Tendaro en Lančov, Ĉeĥio, kie mi konatiĝis kaj amikiĝis kun multaj esperantistoj el diversaj landoj. Post SET en Lančov mi plurfoje estis kaj gitarludis kun la muzika grupo Trifolio en renkontiĝo de polaj, ĉeĥaj kaj slovakaj esperantistoj (sur la komuna limo de tiuj landoj) sur la monto Ĉantorio kaj dum la 63-a Universala Esperanto-Kongreso en Varna, Bulgario.

**Elena:** Ĉu okazis por vi iuj malfacilaĵoj pro lingvaj aŭ kulturaj diferencoj? Ĉu vi memoras tiun eventon ĝis nun? Se jes, kial?

**Stano:** Mi memoras, ke en iu mia kurso lernanto demandis: Kio estas “falfolia arbo”? Mi klarigis, ke aŭtune folioj sur arboj sekiĝas kaj falas sur la teron. Lia respondo: En Brazilo la foliarboj estas daŭre verdaj kaj la folioj ne falas!

**Elena:** Kiel reagis viaj amikoj/parencoj/konatuloj/najbaroj ktp. en socialismaj tempoj al via “nova” lingvo? Al via esperantumado?

**Stano:** Pozitive. Esperanto donis al ni, malgraŭ (aŭ dank’ al) la tiama reĝimo, esperon je pli justa mondo.



**Elena:** Kiun Esperanto-eventon vi memoras pli? Kial?

**Stano:** Verŝajne mian instruadon en Finnlando (parto de la kursanoj sur la supra foto, mi kun mia edzino, sube dekstre). En la universitato de Jyväskylä mi gvidis en la jaro 1978 Esperanto-kurson. Esperantistino, laponino, kiu invitis min, atentigis min, ke finnoj estas “iom aliaj” ol kutime eŭropanoj. Kaj vere: mi instruas per rekta metodo: bildoj, miaj agoj – kaj reagoj de la kursanoj. Sed miaj finnaj kursanoj unue tute ne reagis, nur rigardis min. Sed iom-post-iom “la glacioj degelis” kaj ili reagis pli kaj pli. Ĉe la fino ili estis eĉ “pli vivaj” ol kutime – kaj dum la adiaŭo ili ĉiuj donacis al mi florojn kaj duono de ili ploris. Unu ploranta knabino eĉ diris, ke ŝi amas min, kvankam apud mi staris mia edzino. :-)

**Elena:** Ĉu vi povas rakonti pri la plej ridinda okazaĵo rilate al Esperanto?

**Stano:** Iam mi gvidis Esperanto-kursojn en tiama GDR. Foje mi prenis tien ankaŭ mian edzinon Olga. La organizantoj demandis: “Kaj kie vi lasis vian etan filinon Linda?” Olga hezitis inter la vortoj *bopatrina* kaj *avino* kaj mise kombinis la vortojn – kaj respondis: “Ĉe nia *bovino*” :-).

**Elena:** Pri la plej trista?

**Stano:** Pri la plej konfuza, eble? – Mia edzino laboris kiel sekretariino de vic-direktoro en paperfabriko, kie ankaŭ





mi laboris kiel majstro, fakestro. Al tiu vicdirektoro ofte venis ankaŭ sekretaj policistoj. Foje Olga rimarkis, ke apud nia domo promenas sekreta policisto kaj ofte rigardas al niaj fenestroj kaj al niaj rotaciantaj antenoj. Venis al mi la ideo, ke se ili observas min, eble ili ankaŭ sekrete aŭskultas mian telefonon. Mi prenis ĝin kaj diris: "Se tiu marioneto sub niaj fenestroj ne malaperos, vi vidos kion mi faros!" Tuj venis aŭtomobilo kaj "malaperigis la marioneton".

Ankoraŭ unu trista, konfuza, sed ankaŭ gaja travivaĵo: La muzika grupo TEAMO, kies manaĝero mi estis, estis invitita en la jaro 1989 al la fama muzika festivalo en Sanremo, kiel la plej populara muzika grupo en Ĉeĥoslovakio (3-foje "Ora Najtingalo", *Zlatý slávik*, vidu la foton supre dekstre – la plej prestiĝa muzika enketo en la tiama Ĉeĥoslovakio). Al la fama koncertejo nin veturigis el la hotelo



1989 majo  
82-a jaro  
n-ro 1001 (5)

(aparta monato ekde de aŭgusto)

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun un kaj unesko)  
sidejo: neuwe binnenweg 176 • 3015 bj rotterdam • nederlando

# esperanto

(ISSN 0014-0605)



Esperanto kaj rokenrolo  
furore kombiniĝas en Slovakio!

polica transportilo (kiel ĉiujn aliajn mondstelulojn). Estis tie miloj da homoj. La policanoj kreis koridorojn antaŭ la pordo de nia aŭto per siaj korpoj, tra kiuj ni devis sekure trairi la homamason al la enirejo de la koncertejo. Nia gitaristo Dušan Antalík paŝis antaŭ mi kun du gitaroj en la manoj. Subite alkuris al li policisto kaj proponis porti gitarojn al la "maestro" (majstro). Embarasita, Dušan donis al li la gitarojn, sed turnis sin al mi kaj ofendis la policanon en Esperanto, kiun ni ofte uzis kiel sekretan lingvon: "Stulta k...!" – Sed Esperanto tre similas al la itala kaj la itala policisto komprenis la ofendon! Li faligis la gitarojn sur la teron kaj saltis al Dušan. Feliĉe, la policisto estis tiritita for fare de liaj kolegoj. Nenio okazis al li, nek al la gitaroj – kaj ni alvenis al la



Stano, 2-a de maldekstre, kun 3 TEAManoj sur la marbordo en Sanremo.

salono, kie TEAMO koncertis inter aliaj steluloj. Leciono: ne uzu Esperanton kiel sekretan lingvon en Italio!

**Elena:** Vi rakontis en via antaŭa intervjuo pri via radioamatora sperto. Ĉu vi sukcesis en tiamaj tempoj “kapti” iujn elsendojn en Esperanto?

**Stano:** Jes, ekzemple Polan Radion en Esperanto. Sed mi kaptis ankaŭ televidajn kaj radiajn programojn el ĉiuj najbaraj landoj, en iliaj lingvoj.

**Elena:** Vi multe vojaĝas. Ĉu okazis iam, ke Esperanto tute neatendite helpis vin surstrate?

**Stano:** Jes, sed verŝajne precipe en urboj, kie okazis Esperantaj aranĝoj.

**Elena:** Ĉu vi povas kalkuli, almenaŭ proksimume, en kiom da landoj vi havas amikojn, danke al Esperanto?

**Stano:** Tion mi ne kapablas kalkuli. Krom personaj amikoj mi ekkonis ankaŭ partoprenantojn de multaj E-aranĝoj (kongresoj, kursejoj, renkontiĝoj...) en diversaj landoj, ankaŭ kontribuantojn al Esperanto-gazetoj, kiujn mi redaktis kaj ankaŭ nun redaktas – mi havas kun ĉiuj tre bonajn, amikajn rilatojn. Esperanto ja estas lingvo de amikeco!

**Elena:** Ĉu en ĉiuj kontinentoj?

**Stano:** Eble ne en ĉiuj, krom Arktiko kaj Antarkto...

**Elena:** Bravo al vi kaj al nia Esperanto!

Ĉar nia rubriko nomiĝas *Interkultura Mondo*, mi ne povas ne demandi: kiel Esperanto helpas al interkultura edukado de homoj? Kiel ĝi helpis al vi en tiu senco?

**Stano:** Danke al Esperanto mi vizitis multajn landojn kaj ekkonis iliajn kulturojn, historiojn, arkitekturojn, vidindaĵojn, loĝantojn...

**Elena:** Ni vidas, ke moderna mondo iĝas pli kaj pli nestabila – interalie pro interkulturaj problemoj. Ĉu Esperanto kapablos helpi venki ilin?

**Stano:** Ni esperu – ne, ni kreu, ke nia lingvo helpas solvi multajn interkulturajn problemojn. Ĝi ja estas ponto inter la malsamaj lingvaj komunumoj kaj nacioj, facila, praktika kaj neŭtrala.

**Elena:** Kion oni devas fari por tio?

**Stano:** Klopodi disvastigi Esperanton, informi, instrui, montri la avantaĝojn.

**Elena:** Kia vi vidas estontan mondon?

**Stano:** Mi estas optimisto – la estontecon kreas ni ĉiuj. Ni klopodu fari ĝin pli kaj pli bona, ankaŭ pere de nia kara lingvo de amikeco kaj paco.

**Elena:** Jes, mondo kun Espero al Paco kaj Amikeco – mondo kun Esperanto!

*Interkultura Mondo esprimas korajn gratulojn kaj dankojn al Stano Marček pro la interesa intervjuo kaj lia multjara sukcesa laboro por Juna Amiko, ILEI kaj Esperanto!*

Anonco pri la koncerto dum la 74-a UK en Brajtono en la kongresa kuriero. ↴



Merkrede je 20.00, kadre de la Juna Amiko Festivalo, okazos en salono Zamekovi koncerto de la rokbanda grupo TEAM.

Tamen pri la plej populara slovak grupo, kies anstingraj diskoj venditas centmilojn en Ĉeĥoslovakio kaj kioe kantoroj oni ĉiutage ŝutas en radio aŭ vidas en televido. La grupo komencis okupiĝi pri Esperanto jam je sia naŭaĵa, nun, kiel ĉiujn (kune kun koloraj ŝiftoj) kaj anstingraj serio de la diskoj estas akceptita en la kongresa libroservo.

Antaŭ kelkaj semajnoj la kongresiva Literatura Fojro elstolis kasedon kun la plej sukcesaj kantoj de TEAM sub la nomo "USA TEAM". La kasedo (kune kun koloraj ŝiftoj) kaj anstingraj serio de la diskoj estas akceptita en la kongresa libroservo.





# La 108-a Universala Kongreso en Torino, 29.7.-5.8.2023

Torino estas pli ol dumil-jaraĝa urbo, situanta en la nordokcidenta parto de Italio.

En ĝi troviĝas multnombraj muzeoj, galerioj, palacoj, placoj, kasteloj, parkoj, diverstipaj monumentoj, preĝejoj kaj aliaj religiaj konstruaĵoj. Tie, en la kapelo *Sindone*, troviĝas ankaŭ la fama Mortotuko. La plej karakteriza monumento estas nepretervidebla turo kun bela kupolo. Temas pri la 167,5 metrojn alta *La Mole Antonelliana*. En ĝi estas instalita muzeo pri film-historio. La urbon trafluas la granda rivero Pado kun ties tri alfluantoj. Torino estas konata pro siaj tradicioj en kuirarto: picoj, vinoj, kafoj, ĉokoladoj, glaciaĵoj, specialaj dolĉaĵoj kaj ankaŭ la aŭtomobil-firmao Fiat. Ĝia simbolo estas Taŭro. En la urbo troviĝas sennombraj verdaj fontanoj kun taŭra kapo, el kiu fluas trinkakvo.

En Torino jam okazis pluraj E-kongresoj. Ĉi-foje la kongresejo situis en la Politeknika Universitato de Torino. Al la kongreso aliĝis 1319 geesperantistoj el 69 landoj. Venis reprezentantoj el ĉiuj kontinentoj. La kongresa temo estis: "Enmigrado – kunfluo de homaj valoroj". Ĝi estis traktata en pluraj prelegoj.

Sabate la 29-an de julio la ĉina esperantistino Gong Xiaofeng (Arko) estis elektita kiel nova estraranino de UEA. Vespere okazis la kutima, kaj jam de pluraj jaroj ŝatata Movada Foiro, kie la diversaj E-asocioj prezentis sin per broŝuroj, propagandiloj kaj aliaj Esperanto-objektoj, kun la intenco akiri novajn membrojn por sia asocio.



Dimanĉe en la salono Zamenhof okazis la solena malfermo de la kongreso, fare de la prezidanto Duncan Charters kaj poste la kongresanoj kunfotiĝis. Tuj en la posttagmezo komenciĝis la kongresa programo: IKU-inaŭguro, paroligaj lecionoj, Ĉina Tago, Enkonduko al la Kongresa Temo, prelego pri Italio, Aŭtora duonhoru, Komitata Forumo, ILEI-prezento kaj aliaj prezentaĵoj. La tuta kongresa programo estis tre ampleksa, do ne eblas listigi ĝin, kaj ne eblas partopreni en ĉiuj eventoj, kiuj okazis samtempe en diversaj salonoj. Ĉiu devis mem elekti tion, kio plej konvenis kaj plaĉis.

Dum la Kleriga Lundo kaj la marda Tago de Lernado okazis multaj interesaj prelegoj, koncernantaj ne nur la lernadon. Tiuj tagoj estis tre aprezataj de la kongresanoj. Dum la semajnaj antaŭtagmezoj eblis aŭskulti koncertojn de Grazia Barboni, Flut-tripo, Kimo, Kajto, Bardoj, JoMo, Jomart kaj Nataŝa, Kjara, Abel kaj spekti teatraĵojn: "Ludoj kun diablo kaj reĝo" aŭ "D-ro Esperanto". Vespere okazis jenaj prezentaĵoj: Nacia Vespere, Bankedo kaj Kongresa Balo,



Teatraĵo “Mi diros al vi sekrete”, prezentita de Georgo Hanzlik kaj Saša Philipoviĉ, koncerto “Blua Horizonto” kaj “Internacia Arta vespero”.

Ĵaŭde posttagmeze okazis la tradicia futballmatĉo, en kiu ĉi-foje venkis je 6:3 la teamo de esperantistoj kontraŭ tiu de peruaj enmigrintoj.

En la enirhalo sukcese prezentiĝis membroj de la venonta kongreso en Tanzanio, vendante multajn interesajn objektojn al la geesperantistoj. Tanzania ambasadorino en Italio montris sian ĉeeston inter la venontjaraj organizantoj de la kongreso en Aruŝa. Ankaŭ ĉeĥoj vendis diversajn artikolojn (ĉemizojn, librojn kaj italajn vinojn), por profitigi la venontjaran kongreson. En la vestiblo estis instalita libroservo. Tie eblis aĉeti librojn donace por Tanzanio, sed ne nur. Samloke okazis aŭtoraj duonhoraj prezentadoj de diversaj libroj. Kiel kutime okazis ankaŭ Esperanto-kursoj kaj KER-ekzamenoj de ĉiuj niveloj. Aperis pluraj artikoloj en ĵurnaloj.

Dum la kongreso prezentiĝis pluraj asocioj. Okazis Ekumena Diservo, Erasmus+, TEJO sinprezentas, Internacia koruso, Ŭonbulismo, Bona Espero, Bel-artaj konkursoj, Oratora konkurso, UNO kaj UNESKO, prelegoj pri Italio, itala lingvo, meditado, vortoj-ludoj, Afriko, Eŭropo, Ameriko, Juristoj, Esperantologia Konferenco, Libroj de la jaro, Bobelarto, Komitata forumo, UEA respondas, Aŭkcio, Greziljono, Venontaj UK-oj, Scienca Forumo, Ateliero pri origamio\*. La kongresa kuriero “La Taŭra voĉo” informis pri aktualaĵoj kaj ŝanĝoj en la programo.

En la korto esperantistoj ne nur dancis, sed ankaŭ lud-lernis. Multnombraj estis duontagaj kaj tuttagaj ekskursoj al interesaj lokoj de la lando, kiuj allogis ĉiutage multajn partoprenantojn. Dum la solena fermo prezentiĝis infanoj el



sia kongreseto kaj ĉe la fino estis transdonita Esperanta flago al la reprezentantoj de la venonta UK en Tanzanio. Ĉiuj estos bonvenaj partopreni la kongreson, okazontan unuafoje en la

Afriko kontinento.

Kion diri ĉe la fino? Koncize, ke ĝi estis tradicia kongreso, kun tradiciaj temoj, konferencoj, amuzadoj. La Landa Kongresa Komitato preparis buntan kaj interesan semajnan programon kaj zorgis pri ĝia bona disvolviĝo. Do, gratulon al la organizantoj de tiu ĉi impona evento.

Liba Gabalda

## Krucenigmo


Solve el la antaŭa numero:

Kaŝitaj proverboj: *Post brua vento subita silento. Mano pekis, dorso pagas.*

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12	13
A	L	E	G	I	T	I	M	A	Ĵ	O	J	*	S
B	E	G	I	D	O	*	A	G	U	S	*	R	U
C	K	A	P	O	*	A	N	A	S	*	T	U	B
Ĉ	A	L	O	*	P	R	O	V	*	R	O	L	I
D	S	E	*	K	R	E	P	*	L	I	M	E	T
E	*	*	P	L	E	N	E	*	I	M	A	G	A
F	P	E	R	A	S	*	K	O	M	E	T	*	S
G	O	N	O	N	O	*	I	R	A	D	O	*	I
Ĝ	S	U	D	O	*	P	S	I	K	O	*	B	L
H	T	I	O	*	A	R	D	E	O	*	T	R	E
Ĥ	B	S	*	A	R	E	O	L	*	B	R	U	N
I	R	*	F	L	A	G	R	*	K	R	O	A	T
J	U	*	R	E	G	I	S	*	R	O	N	D	O
Ĵ	A	V	E	N	O	*	O	S	A	K	O	*	*
K	V	A	G	O	N	*	P	E	N	I	*	P	B
L	E	G	A	J	*	P	A	N	O	*	K	I	E
M	N	I	T	*	S	A	G	O	*	S	E	N	T
N	T	S	*	P	U	R	A	*	F	E	S	T	O
O	O	*	I	M	P	O	S	T	I	S	T	O	J

# Whangarei kaj Waitangi

La rubrikon  
prizorgas:  
Stefan MacGill



**Ni atingis la gravan urban Whangarei, meze de Nordlanda regiono de Nov-Zelando.**


**T**ie mia gastiganto ricevis la taskon prizorgi la Teknologian Centron 'NordTech'. Sur la bildo estas la bonveniga du-lingva ŝildo de la centro:



Ĉiu registara oficejo kaj aliaj instancoj devas havi du-lingvan ŝildon. En Whangarei tio des pli gravas, ĉar tie la proporcio de maorioj atingas 50% de la popolo. Sekve, ege gravas, ke la junaj maorioj en tiu centro ricevu praktikan trejnadon, por ke ili sukcesu en akiro de bonaj labor-postenoj. Por kuraĝigi tion, la Centro enhavas maorian 'marae' – tio estas kultura centro, bazita sur la maoria/polinezia kulturo.

Fakte, en Whangarei prosperas ĉiuj kulturoj. Rande de Whangarei estas malnova minejo (angle 'Quarry'), en kiu

oni elfosis rokojn por konstrui la urban. Tiu loko estas ne plu uzata, do tie estas granda plata loko. La artisma komunumo de la urbo akiris la lokon kaj el ĝi kreis brilan art-centron, kun kafejo, restoracio, suvenir-butiko kaj plej diversaj atelieroj, kie oni faras ceramikaĵojn, lingvo-ĉizajojn kaj plej diversajn varojn. La dua bildo venas el iliaj ĉiumonataj retbultenoj, kiujn mi ankoraŭ





nun ricevas kaj ĝuas. En Nov-Zelando abundas akvofaloj. Do, nesurprize, ke tuj apud Whangarei viziteblas akvofalo. Jam delonge Nov-Zelando ĉerpas tre altan parton de ĝia energio de falanta akvo. Temas pri hidro-energio. Preskaŭ la tuto de la energio uzata en Nov-Zelando venas el reuzeblaj naturaj fontoj. Ĵus, la registaro naskis planon, ke la tuto de energio en Nov-Zelando estos kreita el naturaj fontoj.

Al Whangarei proksima estas la urbeto Waitangi, kie en 1840 estis subskribita traktato inter la brita imperio kaj pluraj

maoriaj ĉefoj. La sekva bildo montras maorian pordegon en Waitangi.

La lasta bildo – Jen amuza ŝildo, kiu avertas pri danĝeraj bestoj. Pri kiu besto temas? Nov-Zelando ne havas krokodilojn, nek havas serpentojn, dinosaŭrojn, tigrojn aŭ leonojn. Temas pri la danĝero de atakemaj pigoj! En certa sezono, ili iĝas agresemaj kaj povas ataki personojn de la aero.

Sekvos en 'Juna amiko' la lasta artikolo pri Nov-Zelando, en kiu ni vizitos la plej nordan punkton de la lando, kabo Reinga.





## Landaj Reprezentantoj – Perantoj de *Juna Amiko*


**Aŭstralio:** Aŭstralia Esperanto-Asocio, G. P. O. Box 2122 Melbourne 3001; *info@esperanto.org.au*. **Aŭstrio:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg; *aon.913548977@aon.at*. **Belgio:** Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekenstraat 169, BE-2000 Antwerpen; *financo@fel.esperanto.be*. **Brazilo:** Brazila Esperanto-Ligo, SDS Bl. P 36, Ed. Venâncio III, sala 303, BR 70393-902 Brasília-DF; *belabutiko@esperanto.org.br*. **Britio:** Esperanto Association of Britain, Esperanto House, Station Rd, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE; *eab@esperanto.org.uk*. **Bulgario:** Mariana P. Evlogieva, PK 973, BG-1000 Sofia; *mrvp@interpres.org*; *ilei@espereto.com*. **Ĉeĥio:** Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-290 01 Poděbrady III.; *polnickypavel@seznam.cz*; *cea.polnickyy@quick.cz*. **Ĉilio:** Héctor Campos Grez, Casilla 231 Curico; *strigo@esperanto.cl*. **Ĉinio:** Gong Xiaofeng, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, Nanchang, CN-330031; *arko.gong@qq.com*. **Danio:** Arne Casper, Bryggervangen 70 4 tv, DK-2100 København; *arnecasper@yahoo.com*. **Estonio:** Ahto Siimson, Russa tee 2, Liu, Audru vald, EE-88302 Pärnumaa; *ahto.siimson@esperanto.ee*. **Finnlando:** Paula Niinikorpi, Rusthollintie 6 as 10, FI-28430 Pori; *paula.niinikorpi@gmail.com*. **Francio:** Saïd Balouchi, *said.balouchi@esperanto-france.org*. **Germanio:** Esperanto-Buchversand, Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, DE-55129 Mainz; *wolfgang.schwanzer@esperanto.de*. **Germanio:** Zsófia Kóródy, Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz; *zsofia.korody@esperanto.de*. **Hispanio:** Pedro Garrote, Apartado 119 Esperanto, ES-47080 Valladolid; Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, ES-08200 Sabadell, *sandra@esperanto.cat*. **Hungario:** Jozsef Nemeth, Fo u. 41/5, HU-8531 Ihász; *jozefo.nemeth@gmail.com* (por superaj membroj de ILEI); Stefan MacGill; *stefan.macgill@gmail.com* (por simplaj abonoj). **Islando:** Islanda Esperanto-Asocio, Pósthólf 1081, Skolavorðustigur 6B, IS-101 Reykjavík; *esperanto@isl.is*. **Israelo:** Gian Piero Savio, Rehov Menora 13/4, IL-5349007 Givatajim; *saviogp@netvision.net.il*; *esperantisto@live.com*. **Italio:** Luigia Oberrauch Madella, via Prampolini 8, IT-43122 Parma; *esperoenparmo2020@yahoo.com*. **Japanio:** Japana Esperanto-Instituto, Japana filio de ILE, JP-162-0042 Tokyo-to, Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3; *esperanto@jei.or.jp*. **Koreio:** 464 Ho, Toegye-ro 217, Jung-gu Seoul, KR-04558, Republic of Korea, Korea Esperanto-Asocio, K-filio de ILEI, *www.esperanto.or.kr*, *kea@saluton.net*. **Kroatio:** Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb; *marija@hes-keu.hr*. **Kubo:** Kuba Esperanto-Asocio, Apartado Postal 5120, CU-10500 La Habana 2. **Litovio:** Litovia Esperanto-Asocio, ab/k 167, LT-3000 Kaunas; *irenaa@takas.lt*. **Nov-Zelando:** David Ryan, PO Box 3867, Wellington 6140, *ryangomez@extra.co.nz*. **Pakistano:** Jawaid Eahsan, P.O. Box 26, PK-60000 Multan. **Pollando:** Magdalena Tatara, Grzegorzeczka 74/4, PL-31-559 Kraków; *mtatara@gmail.com*. **Portugalio:** Portugala Esperanto-Asocio, Rua Dr. Joao Couto 6, R/C A, PT-1500 Lisboa; *asocio@esperanto.pt*. **Rumanio:** Ioan Crâncău, B-dul București 5/53, RO-430281 Baia Mare. **Rusio:** Halina Gorecka, ab. ja. 1205, RU-236039 Kaliningrad; *sezonoj@mail.ru*. **Slovakio:** Peter Baláž, Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske; *petro@ikso.net*. **Slovenio:** Višnja Branković, Via Parini 5 IT-34 129 Trieste. **Sud-Afriko:** Colin Beckford, C2 Plaza Hill 3, Bower Road, ZA-7800 Wynberg. **Svedio:** Sten Svenonius, *fidinda@outlook.com*. **Svislando:** Christoph Scheidegger, Im Schleedom 6, CH-4224 Nenzlingen; *ch\_scheidegger@bluwin.ch*. **Tajvano:** Reza Kheirkhah, No. 105, Chung Ching Road, Pingtung, 900-73; *rezamenhof@yahoo.com*. **Togo:** Koffi Gbeglo, B. P. 13169, Lome; *esp.togo@cafe.tg*. **Usono:** Esperanto-USA, 91-J Auburn St #1248, Portland ME 04103; *eusa@esperanto-usa.org*. **Por vidhandikapuloj:** Vjačeslav Suslov; *gloro59@yandex.ru*. **Mendojn eblas sendi ankaŭ al** *ilei.abonoj@gmail.com*.

# 108-a Universala Kongreso de Esperanto



Esperanto, la lingua universale dell'amicizia tra Poli e Ogr il congresso con 1.200 delegati

BONVENON AL LA EKSTERORDINARA UNIVERSALA KONGRESO ARUŠA, KILIMANĜARO 2024



Esperanto-Asocio de Tanzanio, kunlabore kun Afrika Komisiono de UEA

Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda